

EL POPOLA CINIO

中國農道

8

1997

ISSN 1031-4361

*Universitato
de kamparanoj*

Pri orkideoj
Huang Nai penadas
en mallumo



Umefloro

Foto de LI YUWEI

INTER NI

Por kontentigi la bezonon de niaj legantoj, ni ĉiam penas variigi la enhavon de nia revuo, esperante, ke niaj novaj temoj estos ŝatataj.

En tiu ĉi numero legiĝas ne nur artikoloj pri Esperanto, socia vivo, scienco, kulturo kaj ekonomio, sed ankaŭ antikvaj poemoj kaj artikoloj pri besto-protektado, orkideo k.a. La artikolo “Universitato de Kampanoj” prezentas korespondan lernejon, kiu gvidas kampanojn en lernado kaj praktikado de agrikulturaj teknikoj. La agrikultura produktado de Ĉinio havas longan historion, tamen ĉiam postrestis pro malnova koncepto pri kaj malnovaj metodoj de produktado. Tion kompreninte, nunaj kampanoj fervore lernas sciencajn sciojn kaj teknikojn. Per sciencoj kaj teknikoj iuj lokoj levis la produktokvanton de plantoj kaj sin liberigis de malriĉeco. Nun kampanoj lernas sciencajn sciojn kaj

teknikojn en diversaj manieroj, ekz. koresponda agrikultura lernejo, pri kiu la artikolo raportas.


La problemo de enoficigo estas vaste atentata. Kiel ĉinaj junuloj havigas al si okupon? Kia okupo plaĉas al ili? Niaj legantoj trovos la respondojn en la artikolo “Por Bona Okupo”. Ĝenerale, junuloj povas trovi okupon konvenan al ili, se ili diligentas, precipe se ili havas ian lertecon.

La rubriko “Ĉinaj E-istoj” prezentas artikolon pri travivaĵoj de Huang Nai. Malgraŭ sia blindeco, li ĉiam obstine kaj entuziasme laboras por la blindula afero kaj E-movado. Lia faro emocias kaj inspiras multajn ĉinajn esperantistojn.

Niaj legantoj povas ankaŭ ĝui du el la plej antikvaj ĉinaj poemoj pri am-afero esperantigitaj de s-ro Shi Chengtai.

La Red.

El Popola Ĉinio




Bredistino kaj lemuroj
Foto de Liu Sigong

Bredistino kaj lemuroj en la Pekina Centro por Protekto de Pereontaj Bestoj

EL POPOLA ĈINIO
Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"
Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"
Direktoro: Hou Zhiping
Adreso: P.O.Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

ENHAVA VOJO

- 2 **INTER NI**
- 4 Universitato de kamparanoj
- 6 Ŝovinismo aŭ internaciismo
- 7 **KORESPONDI DEZIRAS**
- 8 **ĈINAJ E-ISTOJ:**
Huang Nai penadas en mallumo
- 12 **ORIGINALE VERKITAJ:**
Karmo (Novelo)
- 14 **ESP-NOVAĴOJ**
- 15 **POR KOMENCANTOJ:**
Ĉevalino fine mamnutras sian idon
- 16 **TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:**
Pri orkideoj
- 21 **HOMARO KAJ NATURO:**
Sur la Leŭsa Altebenajo
- 24 Senfina kurejo
- 25 En vilaĝo de vaks-tinkturaĵoj
- 28 Protekti niajn kunulojn
- 29 **SUR LA SILKA VOJO:**
Xinjiang kaj la Silka Vojo
- 36 **EKONOMIE:**
Kiel Pekino traktas rubon?
- 38 **MULTNACIA ĈINIO:**
Revizito al paŝtejo en Qinghai
- 40 **JUNULARO:**
Por bona okupo
- 42 **FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:**
Rikoltistoj de tritiko
- 44 Klasikaj poemoj
- 45 Gajaj kanceruloj
- 47 Turismo en Hongkong
- 48 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 50 Kaligrafo Tian Yuxin
- 51 **ĈINAJ POŝTMARKOJ:**
Wulingyuan
- 2 Umefloro
- SUR LA DORSKOVRILO:**
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Näsijärvi-lago de Finnlando;
Boatejo ĉe lago



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- 1. Qinghai-provinco (p.38)
- 2. Yunnan-provinco (p.16)
- 3. Shandong-provinco (p.4)
- 4. Zhejiang-provinco (p.48)
- 5. Shaanxi-provinco (p.48)
- 6. Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono (p.42)

Universitato



Instruisto de la universitato (la dua de maldekstre) lekcias surkampe.

TIO estas universitato, kiu ne havas ĉirkaŭmuron, sed ĉie en la vasta kamparo de Ĉinio troviĝas ĝiaj studentoj. La lernado daŭras unu jaron, tamen la diplomo estas rigardata de nemalmultaj kamparanoj kiel "paspermeso" por forigi malriĉecon.

Ĝi nomiĝas la "Ĉina Koresponda Universitato por Teknike Riĉigi la Kamparon". Ĝia rektoro estas Xiang Huaming, diplomita el biokemia fako. Menciante la celon funkciigi la lernejon, li diris, ke Ĉinio havas 1.2 miliardojn da loĝantoj, el kiuj 80% estas kamparanoj. Por efektiviigi la ŝtatan modernigon estas necese prosperigi agrikulturon per sciencoj kaj teknikoj kaj ŝanĝi la troan ŝarĝon de loĝantaro en grandegan riĉfonton de laborfortoj. Antaŭ 12 jaroj la Ĉina Scienc-teknika Asocio kaj la lokaj scienc-teknikaj asocioj

starigis popularsciencan edukan reton por doni agrikulturajn teknikojn al malriĉaj kamparanoj.

VIZAĜE AL LA KAMPARANARO

Iasence, la nomita lernejo laboras por helpi malriĉajn kamparanojn de Ĉinio, sekve la lernopago estas tre malgranda. Multaj lokaj registaroj opinias, ke helpi la malriĉajn kamparanojn per sciencoj kaj teknikoj estas grava rimedo liberigi ilin el malriĉeco. Tial ili preferas pagi por la nepagipovaj kamparanoj lernokotizon. Ili ankaŭ postulas, ke la registaraj kadroj la unuaj vizitu la lernejon. En la pasintaj dekelkaj jaroj la lernejo elkulturis pli ol tri milionojn da lernantoj, el kiuj duono estis kamparanoj-kadroj. Ili gvidas kamparanojn disvolvi produktadon per sciencoj kaj teknikoj.

En 1992 Li Lianshou, kamparano-kadro de Shandong-provinco, ellerninte en la lernejo teknikojn kultivi legomojn en forcejo, liberigis sin la unua el malriĉeco. Poste li lernigis la teknikojn al vilaĝanoj kaj gvidis ilin konstrui 1 200 forcejojn por kultivi tomatojn, kaj rezulte de tio, la pokapa enspezo de la vilaĝanoj naŭobliĝis post tri jaroj. Nun en la vilaĝo estas biblioteko, distrejo, lernejo, infanĝardeno kaj maljunulejo. Li ne nur dediĉas sin al la vilaĝa ekonomia disvolviĝo, sed ankaŭ sendas lernigi teknikojn aliloke. Li ankaŭ donas siajn spertojn al vizitantoj kaj aranĝas al ili manĝon kaj loĝejon.

Virinoj, kiel ĉefaj partoprenantoj de la familia ekonomia disvolviĝo, estas ĝenerale malalte klerigitaj. Ekz., 80% el la analfabetoj en la regiono Dezhou de Shandong-provinco estas virinoj. La lokaj scienc-teknika asocio kaj virina federacio kune funkciigis por ili dekojn da kursoj. Post sistema trejnado estis elkulturitaj nemalmultaj agrikulturaj teknikistinoj.

En la lastaj jaroj la lernejo funkciigis diversajn kursojn por malliberuloj. Ĉar duono de ili estis kamparanoj kaj iuj el ili faris krimon pro malfaciloj en la vivteno. En Jidong(Ĝjidong)-malliberejo de Hebei-provinco ĉiujare 400-500 malliberuloj sin anoncis por lerni en la lernejo plantadon, bredadon, arkitekturon k.a. Plejparto el ili estis junuloj. Liberigitaj, ili ne maltrankviliĝis pri la vivteno nek faris krimon.

PRAKTIKO KIEL LA FUNDAMENTO

Por kiel eble plej rapide liberigi kamparanojn el malriĉeco oni

de kamparanoj

devas trovi la kialojn de malriĉeco kaj doni konvenan instruadon. La lernejo starigis 52 fakojn de kvin fakultatoj laŭ la principo instrui al la kamparanoj teknikojn urĝe bezonatajn, facile lerneblajn kaj rapide profitdonajn. La lernejo invitis fakulojn plej spertajn en kompilado de lernolibroj de pli ol 300 titoloj. Inter la instruistoj dungitaj de la lernejo estas profesoroj kaj lokaj teknikistoj. Ili instruas agrikulturajn teknikojn al kamparanoj en la morta sezono de kamplaboroj, faras ĉelokan direktadon en la ĉefsezono kaj konsultiĝas en korespondo, radio kaj televido.

Printempe ĉi-jare la lernejo sendis fakulojn al la malriĉa montregiono de Guizhou-provinco. Iu maljuna fakulo pri brutobredado insiste veturis tien kun ili. Suferante de kormalsano, li ĉiutage prenis medikamenton por daŭrigi la instruadon. Li ĝustatempe montris la problemon, ke la tieaj 100 000 porkoj vivas en unu sama porkejo, kaj diris, ke tio facile kaŭzos al ili infekton. Li ankaŭ helpis la bredistojn rekonstrui la porkejon. Oni diris kun emocio: “Ni finfine ekhavis instruiston!”

La populariĝo de sciencoj kaj teknikoj en la kamparo donas profiton ne sole al la kamparanoj, sed ankaŭ al agronomoj. Ili diris, ke en ĝi multe da riĉfontoj ankoraŭ ne estas ekspluatitaj pro manko de teknikoj. Tio helpas ilin elekti scienc-esplorajn temojn kaj disvolvi sian talenton.

Inter la malriĉuloj de Ĉinio estas nacimalplimultanoj. Por ili la lernejo eldonis la lernolibrojn en pli ol 10 nacimalplimultaj lingvoj.

La ji-oj vivantaj en sudokcidenta Ĉinio plejparte loĝas en montregionoj minimume 2 000 m super la marnivelo. Tie abundas pluvo kaj sunbrilo, tamen ili malfacile sin vivtenis pro postĝinta kultivado. Instruistoj de la lernejo unue helpis al ili likvidi analfabetecon, poste instruis al ili modernan agrikulturan kultivadon... Kaj rezulte la ji-oj ne plu maltrankviliĝis pri sia vivteno, ili konstruis aŭtovojon kaj transportis grandan kvanton da ajloj, terpoj kaj aliaj agrikulturaj produktoj al aliaj lokoj por vendi.

Cirkulis popoldiro, ke la montanoj vivas el montaj produktoj, tamen ili ne sciis, ke senbrida hakado de arboj nuligas la vivrimedojn. Kuŝas malgranda montvilaĝo ĉe la suda piedo de Yanshan-monto en Hebei-provinco. Kiam la koresponda lernejo tie funkciigis kurson pri kultivado de frukt-arboj, la vilaĝanoj ekkomprenis la gravecon arbarizi monton. Ili plantis 150 000 kaŝtanojn sur 467 hektaroj da montoj kaj konstruis akvobaraĵojn sur ili. Nun la vilaĝanoj greftas kaŝtanojn per nova tekniko kaj la arboj fruktas en la sama jaro. Ili diris: “Se oni volas riĉigi montregionon, oni devas lerni teknikojn kaj planti pli da arboj.”

ADAPTIĜI AL LA REFORMADO

“Bredi bovon por plugado, kaj kokon por ŝanĝi ĝin kontraŭ salo.” Ekde la antikveco tiu ĉi tradicia koncepto katenas la kreivon de la kamparanoj. Instruistoj de la lernejo diris al ili, ke memsufiĉeco ne riĉigas, se oni grandskale bredas bovojn kaj kokojn, oni povos per tio perlabori monon, kaj granda

profito dependas de utiligo de riĉfonta avantaĝo. Konforme al la lokaj kondiĉoj la instruistoj instruas teknikojn konvenajn por la loko. Nelonge poste, formiĝis nova dispozicio por produktado en ĉiuj vilaĝoj. Ili bredas testudojn, kultivi pomarbojn, faras bambuplektadon kaj produktas silkon. Samtempe kun tio, ili ankaŭ donas al la lernantoj merkatajn informojn por faciligi al ili vendadon.

Por la bezono de la kamparanoj, kiuj ne sciis vendadon sur la merkato, la lernejo funkciigis kursojn kaj instruis ilin pri graveco de la kvalito de produktoj sur la merkato, rolo de reklamo kaj psikologio de konsumantoj. La kamparanoj, kiuj plialtigis sian vivnivelon, ankaŭ aspiras al pli alta spirita vivo. Ili konstruis vilaojn, tamen ili ne sciis dekori ilin. La lernejo kompilis la lernilon “Familia Administrado”, kiu temas pri dekoraciado de loĝejo, edukado de infanoj kaj vivtenado de maljunuloj. Ĝi aparte analizas defion de la socia reformado al la edzeco, ekz., se la edzo fariĝis entreprenisto kaj lia edzino, kiel dommastrumanto, estas ankoraŭ analfabeto aŭ duon-analfabeto, do al ili mankas interkompreniĝo kaj feliĉo de moderna familio. Tiam nepre necesas plialtigi la klerecon de la edzino. Kun la socia reformado kaj disrompiĝo de tradiciaj konceptoj pli kaj pli oftigas la kontaktiĝo inter viroj kaj virinoj. La geedzoj devas adaptiĝi al tio. Ĉio ĉi multe helpas la kamparanojn kaj pro tio ili rigardas la lernejon kiel sian plej bonan lernejon. ■

Ŝovinismo aŭ internaciismo

– Memore al Verda Majo



Verda Majo kaj Liu Ren ĉe sia geedziĝo (1936)

Okaze de la 85-a datreveno de la naskiĝo kaj la 50-a datreveno de la forpaso de japana samideano kaj internaciisma pacbatalantino Verda Majo, ni petis s-ron Liu Ling, eksan agantan ĝeneralan sekretarion de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj kompilinton de “Verkoj de Verda Majo”, skribi tiun ĉi artikolon por rememorigi pri ŝi.

La Red.

ANTAŬ pli ol dek jaroj, kunlaborante kun mia japana amiko, s-ro Miyamoto Masao, mi kompilis kaj eldonis libron “Verkoj de Verda Majo” por memori la 70-an datrevenon de ŝia naskiĝo kaj la 35-an de ŝia forpaso. Mi legis ĉiujn tiam trovitajn ŝiajn verkojn kaj tradukojn en Esperanto, inkluzive de tiuj senditaj de s-ro Miyamoto Masao el Japanio. Mi estis vere kortuŝita de ŝia brava kaj brila vivo. Mi tre bedaŭras, ke mi ne havis ŝancon konatiĝi kun ŝi, kvankam ŝi kaj mi iam loĝis en la sama urbo Chongqing antaŭ 50 jaroj, kiam mi lernis Esperanton kaj legis ŝian verkon tie.

Ŝia vivo daŭris nur 35 jarojn. Precipe dum siaj lastaj dek jaroj, kiam ŝi restis en Ĉinio, ŝi trapasis la plej malfacilajn kaj ankaŭ plej brilajn tagojn. En 1936, kiam la rilatoj inter Japanio kaj Ĉinio jam estis tre streĉaj, malgraŭ la kontraŭstaro de siaj familianoj ŝi decideme edziniĝis al sincera samideano, ĉina esperantisto Liu Ren, kaj en la sekvanta jaro venis al Ĉinio. Baldaŭ eksplodis la kruela kaj longdaŭra milito inter Japanio kaj Ĉinio. Ŝi estis ĵetita en grandan embarason. Ĉe kiu flanko ŝi devas stari? Ŝi skribis en sia artikolo “Amo kaj malamo”:

“Mi amas Japanion, ĉar ĝi estas mia patrio, kie vivas miaj gepatroj, gefratoj, geparencoj kaj geamikoj — kun multe da karmemoroj.

“Mi amas Ĉinion, ĉar ĝi estas mia nova hejmlando, kie min ĉirkaŭas multaj bonkoraj kaj laboremaj kamaradoj.

“Mi malamas, per mia tuto malamegas la hommurdon inter la du popoloj. Kiu el ili viktimum, mi droniĝus en neelsaveblan malĝojon...

“Sed nun, mi volonte aliĝus al la ĉina armeo, se eble, ĉar ĝi batalas por la liberigo de la nacio, ne kontraŭ la japana popolo, sed kontraŭ la japanaj imperiistoj, kaj plie ĝia venko destinos ankaŭ helan estontecon de la Oriento.”

Kun sia skribmaŝino kiel armilo ŝi ekbatalis. Per siaj artikoloj ŝi malkovris al la tuta mondo, kiel la japanaj trupoj masakris ĉinojn, kiel la ĉina popolo brave rezistis kaj kiel suferis la popoloj ĉina kaj ankaŭ japana. Ŝi ankaŭ parolis japane en radiostacio, alvokante la japanajn soldatojn oponi kontraŭ la milito.

Ŝi ne vane laboris por la kontraŭjapana rezistmilito. Precipe ŝia japanlingva disaŭdigo havis grandan influon al la invadaj trupoj. Iu japana soldato eĉ skribis poemeton por esprimi sian emociiĝon post aŭskulto de la disaŭdigo. Tiu "stranga disaŭdigo" en flua japana lingvo ankaŭ kolerigis la japanajn militaristojn. En tagĵurnalo de Tokio ŝi estis kalumniita kiel "dolĉvoĉa naciperfidulino". Lia patro eĉ ricevis timigan leteron, kiu postulis, ke li atribuu al si mem la kulpon kaj sin mortigu. Foje en Chongqing Zhou Enlai diris al Verda Majo: "La japanaj imperiistoj kalumnie nomis vin 'dolĉvoĉa naciperfidulino', sed efektive, vi estas fidela filino de la japana popolo, vi estas vera patrioto." La vortoj donis al ŝi grandan inspiron.

Post la venko de la rezistmilito, laŭ propono de Zhou Enlai, Verda Majo kaj ŝia edzo Liu Ren veturis al la nordorienta liberigita regiono kaj laboris tie. En 1947 ŝi malfeliĉe forpasis en Jiamusi pro infekto post abortigo.

Verda Majo tro frue forlasis nin. Sed ŝi ĉiam vivas en nia memoro. La braveco kaj prudento, la klaraj amo kaj malamo, la senegoisma kaj sindonema entuziasmo al laboro, ĉio ĉi profunde impresis nin. Sed laŭ mi la plej elstara estas, ke ŝi povis sin liberigi de la influo de egoisma ŝovinismo. Ŝi amis siajn popolon kaj patrolandon. Ŝi estis patrioto. Kaj samtempe ŝi amis ankaŭ la popolojn ĉinan kaj aliajn. Ŝi do estis ankaŭ internaciisto. Ŝi ja multe kontribuis por la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. Post la okjara kruela milito kaj longdaŭra suferado la plimulto el la ĉina kaj japana popoloj jam ekhavis la komunan konon, ke ni ambaŭ devas esti amikaj generacion post generacio kaj neniam militu plu unu kontraŭ la alia.

Bedaŭrinde en la nuna mondo ni ankoraŭ vidas, ke militfajro brulas tie kaj tie, ekzemple en Afriko, Azio kaj aliaj lokoj. Oni eĉ blinde atakas kaj masakras nur pro malsamaj naciecoj. La kaŭzoj de milito ofte estas komplikaj. Sed ŝovinismo ja estas brulfortigilo de milito. Iuj instigas ŝovinisman emocion por peli sian popolon al milito. Ŝovinismo ofte estas freneza kaj senprudentigas homojn. Ĝi neniam helpas solvi problemojn, sed nur aldonas brulaĵon al fajro. Kompreneble ĉiuj rajtas defendi la interesojn de sia nacio. Sed estas neniel pravigeble, ke oni troemfazas siajn proprajn interesojn kaj neglektas tiujn de aliaj. Neniu havas la privilegion meti sian nacion super la ali-

ajn. Ĝuste nun ni pli klare vidas, kiel prava kaj prudenta estas la sinteno de Verda Majo. Ŝi bone traktis la rilatojn inter malsamaj nacioj kaj montris al ni modelon tiuflanke. Kiel esperantistoj ni devas multe lerni de ŝi kaj laŭte alvoki: For ŝovinisman! Por internaciismo, paca kunekzisto kaj internacia kunlaboro! ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* S-ro Duan Yongxing, estro de la Muzika Lernejo Nie Er, deziras kontaktiĝi kun tutmondaj esperantistaj muzikistoj, precipe kun tiuj el Orienta Eŭropo. Adr.: 31, Xiba Xincun, 650031 Kunming, Yunnan, Ĉinio.

* Li Luyao, 18-j. studento, volas kor. tm. Adr.: 24, Qingfuxiang, 410005 Changsha, Hunan, Ĉinio.

* Fu Guiqin dez. kor. tm. kaj interesiĝas pri vojaĝo kaj informo-interŝanĝo. Adr.: 20, Shuyuanlu Xialiupujie, 410002 Changsha, Hunan, Ĉinio.

* 23-j. fraŭlino, Sun Meiru, aktorino, dez. kor. kun 25-35-j. fraŭloj en Eŭropo. Adr.: Maxituan, 161006, Qiqihar, Heilongjiang, Ĉinio.

* Popa Florica, emerita instruistino, volas kor. tm. kaj interesiĝas pri turismo, literaturo, artoj kaj E-movado. Adr.: Str. Eroilor 29-7, Timisoara-1900, Rumanio.

* Nicola Adriana, 19-j. lernantino, interesiĝas pri naturo, kulturo, sporto, civilizacio ktp. Adr.: Str. Ion Ionescu de la Brad. BL B 139 Sc B Ap 14, Timisoara-1900, Rumanio.

* 32 gelernantoj (10-14-j.) dez. kor. tm. Volontuloj skribu al Inka Weksler, E-klubo, Poŝtkesto 15, PL 58-400 Kamienna Gora, Pollando.

* Alfred Neussner serĉas interŝanĝon de stampitaj poŝtmarkoj kun la tuta mondo, speciale kun Ĉinio. Adr.: Thüringer str. 3, D-37284 Waldkappel, Germanio.

* Jurio Anuhin, 41-j. elektristo, dez. kor. kun komunistoj tm. Ĉkalova 47-139, Petrozavodsk, RU-185007, Rusio.

* Vlado Romanov, 31-j. ĵurnalisto, dez. kor. tm. pri historio, etnologio kaj ĉ.t. Kuzmina 39-3, Petrozavodsk, RU-185003, Rusio.

* 11-j. Savuskin kaj Lena Kutjkova 27-j., dez. kor. tm. Moskovskaja 17-54, Petrozavodsk, RU-185020 Rusio.

* Sveta Skripkina, 27-j. harpistino, dez. kor. tm. pri muziko, pupteatro, infanoj. Nojbrandenburgskaja 14a-51, Petrozavodsk, RU-185034, Rusio.

Huang Nai penadas en mallumo

de WANG HANPING



Huang Nai kaj Hou Zhiping, direktoro de EPC

S-ro Huang Nai, vicprezidanto de la Federacio de Ĉinaj Kripluloj, faris grandan kontribuon por krei kaj reformi la novan ĉinan brajlon.

EN PROGRESEMA MOVADO

Huang Nai estas filo de Huang Xing, fama burĝ-demokratia revoluciisto, politikisto kaj strategiisto de Ĉinio. D-ro Sun Jatsen, granda pioniro de la ĉina burĝ-demokratia revolucio, kaj Huang Xing kune iniciatis la unuan ĉinan burĝan revolucionan partion. Poste Huang Xing helpis d-ron Sun en la Revolucio de 1911, kiu finis la feŭdan regadon en Ĉinio. Huang

Nai naskiĝis en 1917 en Ŝanhajo, malpli ol 3 monatojn post kiam lia patro mortis.

La patriotismo de la patro multe influis lin. Li decidis sekvi ekzemplon de sia patro. Kiam li lernis en elementa lernejo, li estis estro de la lernanta federacio kaj skoltismo de la lernejo. Kiam li lernis en mezlernejo, li legis la eseon de Hujucz "Impresoj en Moskvo"* kaj ekkontaktis novajn pensfluojn. En someraj ferioj li memlernis Esperanton, legis la Esperantan revuon "La Mondo" kaj vizitis Esp-kurson en Nankino. Ĝuste tiam lia dekstra okulo blindiĝis pro vundo en piedpilkaĉado.

Instigate de sia frato, Huang

Nai veturis al Japanio en 1936 por studi. Tie li konatiĝis kun progresema japana esperantisto Nakagaki Torajiro. Huang kaj liaj kolegoj lernis de Nakagaki Torajiro Esperanton. Inluante de la instruisto, Huang partoprenis en la "Kunsido pri Modernaj Problemoj" kaj "Esperanto-Societo de Ĉinaj Studentoj en Japanio", fonditaj de progresemaĵoj ĉinaj studentoj en Japanio. Tiam li konatiĝis kun Verda Majo (Hasegawa Teru) kaj ŝia edzo Liu Ren kaj helpis ilin veturi al Ĉinio.

En 1937 Huang Nai estis arestita pro sia aktivado en la maldekstruma Esp-movado. Helpate de japanaj amikoj, li estis liberigita. Ĝuste en tiu jaro la japanaj agresantoj invadis Ĉinion. Huang Nai kaj multaj aliaj ĉinaj studentoj senhezite revenis Ĉinion por partopreni la kontraŭjapanan naciŝavan movadon. En la sekvinta jaro li atingis Yan'an, la revolucionan centron de Ĉinio.

En Yan'an Huang Nai sin okupis pri ĵurnalismaj laboroj. Li dediĉis grandan parton de siaj postlaboraj horoj al la loka Esp-movado por helpi Zhuang Dong, kiu respondecis pri la Yan'an-a Esp-Asocio, en kompilado de lernolibroj, eldonado de "Yan'an-aj esperantistoj", funkciigo de Esp-kurso kaj Esp-ekspozicio. Huang estis unu el la plej fervoraj aktivuloj en Yan'an.

La materia vivo en Yan'an estis malfacila. Ĝi serioze miopigis lian maldekstran okulon, tamen li ankoraŭ pli energie esploris

japanajn problemojn.

POR KREI NOVAN ĈINAN BRAJLON

En 1949 li blindiĝis. Ĝuste tiam lia edzino forlasis lin. La malĝojo multe turmentis lin kaj li perdis memfidon pri la vivo. La ŝtato pagis por lia kuracado en alia lando. Tamen oni ne sukcesis kuraci lian okulmalsanon.

Li spertas konstantan mallumon kaj pli bone komprenas la valoron de lumo. Li pensis, kiel valora estas brajlo taŭga por miloj kaj dekmiloj da ĉinaj blinduloj koni la eksteran mondon. Sed tiam en Ĉinio cirkulis du malnovaj brajloj tre malfacile lerneblaj.

Huang Nai iam lernis rusan brajlon. Poste li trovis "Esperanta Ligilo", la organon de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, kun brajla Esperanta alfabeto sur la kovrilpaĝo. Li kores-

pondis kun alilandaj blinduloj-esperantistoj kaj kolektis brajlajn alfabetojn. Li komparis kaj analizis plurajn brajlojn kaj trovis mankojn de la malnovaj ĉinaj brajloj. Li do komencis renovigon de la ĉina brajla alfabeto.

Huang Nai tute absorbiĝis en studo de brajlo. Foje li vekigis en nokto, subite eklumigis lin nova aranĝo de brajlaj punktoj, li do tuj ellitiĝis, palpe trovis kajeron kaj notis la aranĝon sur ĝi. Post ripetfoja provado kaj reformado li finfine kreis novan ĉinan brajlon en 1952. En la sekvinta jaro lia projekto estis aprobita de la Eduka Ministerio de Ĉinio kaj ekpopulariĝis tra la tuta lando.

Post tio Huang Nai gvidis grupon da personoj en kompilo de brajlaj lernolibroj, eldonado de la Monata Gazeto por Blinduloj kaj funkciigo de brajla presejo. Dank' al tiuj brajlaj eldonaĵoj, okazis diversaj kursoj por blinduloj, en kiuj ili ellernis plektadon, akupunkturon, mokson, masaĝon, muzikon k.a. Kun tiuj teknikoj ili fariĝis memstaraj laborantoj.

La brajlo kreita de Huang Nai aplikiĝis 40 jarojn. En la aplikado oni trovis ĝiajn mankojn. S-ro Huang do sin turnis al nova projekto. Li kaj liaj kolegoj laboris 19 jarojn por la nova projekto. En 1995 la Ŝtata Lingva Komisiono decidis popularigi ĝin. Tiu projekto nun estas aplikata en multaj blindulaj lernejoj kaj brajlaj

eldonaĵoj.

KUNLABORE KUN SIA EDZINO

La nova brajlo kreita de Huang Nai alportis feliĉon al la ĉinaj blinduloj, sed lia vivo estis malfeliĉa. La trifoja malsukceso en lia amafero faris lin silentema kaj li sentis ĝojon nur en la brajla kreado.


La sindonemo de Huang al studo pri brajlo kortuŝis reĝisorinon An Lin, je unu jaro malpli aĝan ol Huang, kaj ŝi enamiĝis al li. En 1961 ili faris modestan nupton. Post la edziniĝo An Lin prenis sur sin dommastrumadon. Tage ŝi laboris en filmo-studio kaj vespere ŝi sin okupis pri domlaboroj. Ŝi traktis la gefilojn de Huang kiel siajn proprajn. Ĉiuvespere ŝi voĉlegis por Huang kaj helpis lin en kopiado de brajlaj verkoj, pro tio ankaŭ ŝi ellernis brajlon. Ŝi faris bonajn proponojn al sia edzo. Poste ŝi ĉesigis sian reĝisoradon kaj tutanime helpis lin en ties brajla renovigo.

An Lin emeritiĝis. Ĉiutage ŝi voĉlegas, faras respondojn, ordigas brajlajn materialojn kaj akceptas vizitantojn por sia edzo kaj promenas kune kun li en parko. Estas evidente, ke la sukcesoj atingitaj de Huang ne disigeblas ankaŭ de penado de An Lin.

Huang Nai funkciis kiel membro de la Tutlandaj Komitatoj de la 2-7-aj Ĉinaj Popolaj Politikaj Interkonsiliĝaj Konferencoj. Nun li estas konsiliano de la Bonstatiga Fonduso de la Ĉinaj Kripluloj. Li donis grandan atenton al la vivo de la ĉinaj blinduloj kaj ofte helpas ilin venki malfacilojn. Inter la helpatoj estas blindulo-esperantisto.

Nun Huang Nai arde deziras disvastigi Esperanton inter ĉinaj blinduloj. ■

* Hujucz vizitis Moskvon en 1931, helpate de sovetiaj s-anoj.



Huang Nai (maldekstre en la malantaŭa vico) kaj aliaj ĉinaj studentoj en Japanio



Huang Nai parolis en kunveno de blinduloj en 1981.

S-ro Chu Tunan, eksa vicprezidanto de la Popola Kongreso de Ĉinio, renkontiĝas kun Huang Nai.





Huang Nai kaj lia edzino An Lin



Huang Nai vizitata de ĉina blinda samideano Fan Dongsheng (maldekstre)



Huang Nai kun japana amikino de sia patro

Karmo (Novelo)

de MAO ZIFU



La aŭtoro

ŜIA edzo forpasis en la 30-jara aĝo, lasante al ŝi neniun idon. Mizera Rut adoptis filon en malriĉeco. Kaj la adoptita filo edziĝis antaŭ kelkaj jaroj, tamen la ventro de la bofilino restis ebena. Do, Rut adoptis nepon. Ne per siaj mamoj, sed per siaj manoj ŝi nutris zorgeme du generaciojn.

Feliĉa estis Rut. La filo etestriĝis en ŝtata institucio. La nepo fariĝis oficisto en la centra banko, edziĝis al belulino kaj generis sagacan filon. La pranepo Rut vartis kaj flegis, ĝis li ekvizitis lernejon. Ŝi jam ne estis mizera.

Rut, 70-jara, plenumis la devon guberni pos-

teulojn. Ŝi preferis sen kunulo loĝi en kamparo, dum la posteuloj ĝuis la vivon en urbo. Ili faris nenion kontraŭ ŝia volo. Sola, ŝi loĝis en sia naskiĝovilaĝo dek jarojn, kaj en tiu periodo ŝi estis kontenta, ricevante de la filo aŭ de la nepo sufiĉan sumon por vivteno.

Kiam Rut estis celebranta sian 80-jariĝon, la filo kaj nepo ŝin vizitis, invitis ŝin al sia urbo por soleni la feston, spite al ŝia obstina rifuzo. Ĉe enaŭtomobiliĝo ŝi mienis, ke ŝi ne volas tion fari, kio konfuzis enviajn najbarojn.

Vesperkrepuske ili atingis la urbon. Anstataŭ al la hejmo de la filo aŭ de la nepo, ili veturis rekte

al luksa restoracio. Tie amaso da homoj bonvenigis ŝin kiel reĝinon. Kameraoj televizia kaj kodaka tiel ŝin konfuzis, ke ŝi preskaŭ svena mispensis pri iranto al Elizeo. Plie, dum la festeno la loka kabla televizistacio prezentis kantojn por ŝia naskiĝdatreveno kaj sur la ekrano sinkrone montriĝis la spektaklo de manĝado kaj drinkado. Ho, al ŝi apartenis la vespero. Ŝia 80-jariĝa festo sensaciis la tutan urbon. Neniam antaŭe ŝi atendis, ke ŝia figuro aperos en la televido. Kia aŭtoritatulo la filo fariĝis!... Surdiga la petardo gratula. Surprizita, ŝi ne povis ne kapkline ploreti, kvankam tiam ŝi devis rideti kaj pozi kvazaŭ reĝino antaŭ huraa publiko.

Pro delikata vino Rut apenaŭ meditis, tiu nokto forkuris ekster ŝia konscio.

La sekvantan matenon Rut vekigis ne frue, trovis sin kuŝanta en la hejmo de la filo. Ellitiĝinte, ŝi aŭdis mielan infanan voĉon; "Avino!" Kaj tuj poste la gevirajn:

"Panjo, bonan matenon."

"Panjo, vi estas ankoraŭ laca?"

Manviŝinte la okulojn, ŝi klare ekvidis, kiuj ŝin salutis: la filo kune kun virino kaj knabineto.

Iam Rut informiĝis, ke la filo divorcis kaj post nelonge reedziĝis al virino portanta sian filinon. Ĝis tiu tago ŝi ne havis la ŝancon vidi la novan bofilinon. Tiu ĉi estas pli ĉarma kaj aminda — ĉe ekrigardo Rut ellasis sian rideton kontentan. — La filo estas ne sola.

"Panjo," la bofilino disrompis la gapadon de Rut, "eble la ĉambro estas iom sufoka kaj ne tiom komforta kiel tiu en la vilaĝo. Baldaŭ ni havos pli ventoleblan domon..." Parolante, la bofilino subtenis per la manoj la oldulinon al tablo por matenmanĝo. Ankaŭ la filo dumane.

Vere, monaton poste, ili transloĝiĝis en dua-etaĝan domon, kiu estas multe pli granda ol la antaŭa.

Pro plia domornamado, Rut ekloĝis ĉe la nepo, sub ties sincera persvado. Kompare ŝi havis preferon por la antaŭa domo de la filo en teretaĝo; la nepa alikvartale estis en la kvina etaĝo, maloportuna al olduloj, kaj tian eĉ ankaŭ junuloj ne ŝatis, ĉar tie mankis lifto. Reziĝnacie Rut portempe teniĝis en la domo. Ŝi volis reveni al la vilaĝo, sed ŝi ne foriris pro la pieca petado de la nepo kaj pro tio, ke kontraŭe loĝis pensiulino, kiu iom konis median arton. Ili babilis de tempo al tempo pri Elizeo kaj pri infero...

Unu plia monato pasis. La nepo transloĝiĝis teretaĝen. Pri tio Rut ne perceptis miron. Pere de la babilado kun la pensiulino ŝi sciigis, ke tiam la

ŝtato privatigas komunajn loĝejojn, nome vendas kolektivajn domojn al funkciuloj kaj laborantoj laŭ ties rango, familia stato ktp.

La ornamado de la fila domo ne finiĝis, komenciĝis tiu de la nepa. Ili do portempe luprenis ĉe maljunulejo ĉambraron neetan por la oldulino. Krome la ĉambraro samtempe servis kiel tenejo por la malnovaj mebloj de la du familioj, kaj Rut, kompreneble, estis ankaŭ kiel gardistino.

Kun pacienco Rut atendis la finon de la domornamado. Ŝi jam ne povis reveni al la vilaĝa domo. Ĝin infanoj forbruligis fajroludante, kiam ŝi forestis.

Intertempe la filo kaj nepo alterne faris viziton al ŝi.

"Panjo," la filo domaĝis, "via artrito mildiĝis, ĉu? Bedaŭrinde ni loĝas en dua etaĝo. Ŝtuparrampi probable gravigus la malsanon..."

Kaj la nepo amzorgis: "Avino, ĉu kvietiĝis via reŭmato? Oj, nia domo estas tro humida..."

Al ĉio ĉi tio Rut montriĝis dankema. Ŝi suferis de reŭmatisma artrito kelkdek jarojn. Estas neatendite, ke la filo kaj nepo intencas kuracigi al ŝi la obstinan malsanon je ŝia 80-jara aĝo — nun ŝi ĝojis senmezure.

Tempo flugis, tamen kvazaŭ stagnis ilia domornamado. Konsolinde, ŝi akiris iam kaj iam manĝaĵon kaj uzaĵon eĉ tro sufiĉajn danke al la bofilino kaj bonepino.

Monaton post monato. Feliĉe, la oldulino pli ol-80-jara aspektis forta kaj ankoraŭ ne bezonis alies flegon. Pli mirige estas, ke tiutempe ŝi povis metie fari alplandaĵojn por la idoj.

Iutage la mediumino ŝin vizitis. Ili interparolis proksimume duontagon. Ĉe adiaŭo Rut glutis ploremon.

En la sekva mateno oni trovis, ke Rut mortis. Pro kio? Sciis neniu.

Ŝia funebra ceremonio estis pli solena ol ŝia naskiĝtaga festo.

Baldaŭ la domornamado plenumiĝis kaj por la filo kaj por la nepo. Ilin oni gratulis festenante en la fama restoracio. Pro vino tikla, la mediumino ebriiĝis kaj ekstrancis. Murmure aŭdiĝis:

Mi estas Rut... fi al la maldankemaj... Pretekstante mian reŭmaton, la filo transloĝiĝis supren, pretekstante mian artriton, la nepo transloĝiĝis malsupren... ruzaj... Kaj kun azena kapo la administristoj... vendis apartamentojn laŭ rango, familia stato... Mi estas kamparano por ĉiam... Kial la familia registro pri mi sola apartenas kaj al la filo kaj al la nepo... Ili volus disŝiri min en du partojn...

ĈINIO

● La 19-an kaj la 20-an de aprilo okazis en la urbo Zhongshan, Guangdong-provinco, la Simpozio pri la Turisma Reto de Esperanta Kulturo. Ĝin partoprenis pli ol 70 esperantistoj el diversaj lokoj de Ĉinio. Ili interŝanĝis informojn kaj spertojn pri Esperanta turismo kaj decidis fondi turisman reton de



Simpozio pri la Turisma Reto de Esperanta Kulturo

Esperanta kulturo por akceli la internacian interŝanĝon de kulturoj kaj sciencoj, aplikadon kaj disvastigon de Esperanto. Dum la simpozio, kune kun turistoj el Hongkong kaj Aomen la partoprenantoj okazigis ankaŭ Varman Celebron pri '97 Reveno de Hongkong al Patrujo. (Hou Zhiping)

● Okaze de la 85-a datreveno de la naskiĝo de Verda Majo (la 7-a de marto 1997), oni ellaboris en



Qin Kaiji (meze), organizanto de la filatela ekspozicio

Pekino poŝtkarton kun portretoj de Verda Majo kaj ŝia edzo Liu Ren ĉirkaŭitaj de umefloroj, sakuroj, verda stelo kaj du kunligitaj koroj, kiuj simbolas amikecon inter la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj kaj popoloj. La desegnintoj estas geedzoj Xie Shaoxing kaj Tan Ailing. (Qin Kaiji)

● Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Hujucz, pioniro de la ĉina Esperanto-movado, la Pekina Xiqu-a Poŝtmarka Kompanio kaj pekinaj Esperantaj organizoj kune okazigis filatelan ekspozicion, kiu daŭris 5 monatojn kaj allogis milojn da vizitantoj. (Qin Kaiji)

AŬSTRALIO

● S-ro Brendan Linnane estas vicprezidanto de la Loka Kongresa Komitato por la 82-a Universala Kongreso de Esperanto kaj prezidanto de la Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo. Li kredas, ke Esperanto, por resti lerninda, devas esti kiel eble plej facile lernebla ĉie en la mondo. Por helpi aliajn angleparolantojn, kiuj volas lerni Esperanton kaj uzi ekde la komenco bonan simplan stilon, Brendan kompilis vortaron de 26 000 anglaj vortoj, kiuj estas kunmetblaj el nur 1 000 el la plej simplaj kaj utilaj Esperanto-vortelementoj (la listo de Kontakto, efektive). Ĉiu ajn rajtas havi senpagan ekzempleron de tiu vortaro per la komputil-reto. Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney Sa 5069, Aŭstralio. (Max Wearing)

BRAZILO

● Klubo Esperantista Zamenhof preparadas ekspoziciojn por disvastigi Esperanton kaj grandigi la nombron de esperantistoj. Ili ŝatus ricevi leterojn afrankitajn per belaj poŝtmarkoj ĉiutemaj kaj turismajn faldfoliojn Esperantlingvaj, senditajn el Afriko, Pacifikaj landoj, Karibaj landoj kaj el la etaj landoj de la tuta mondo. Adreso: Clube Esperantista Zamenhof, Lar de Maria, Praca Floriano Peixto, 33, Sao Braz, Belem-Pa, Br-66090-290 Brazilo. (Odilia, Pekim kaj Silva)

LITOVIO

● En Litovio aperis 352-paĝa libro "Internacia Poŝta Servo". Ĝi enhavas 1 305 terminojn, bezonatajn de poŝta komunikado inter landoj de la mondo. La terminoj estas prezentitaj en la litova lingvo laŭ aboca ordo kun mallonga klarigo kaj tradukoj en la lingvoj franca, angla, Esperanto, rusa kaj germana. Interesatoj skribu al: A. Piliponis, Aukt. Teknikos Mokykla, Olandu 16, LT-2600 Vilnius, Litovio. (Algimantas Piliponis)

RUMANIO

● Laŭ informo, la rumana Ministerio pri Turismo respondecas finance pri la rumana turisma magazino Vacante in Romania. Sekve de tio S-ro Ionel Onet sugestas al ĉiuj interesatoj skribi al la koncerna ministerio petante, ke venontjare ĝi financu la aperigon de speciala numero en Esperanto de Vacante in Romania okaze de ĝia 45-jariĝo. Tiuj, kiuj pretas sekvi la sugeston, bonvolu sendi leterojn sialingve aŭ/kaj Esperante al: Ministerul Turismului, str. Apollodor 17, Ro-7000 Bucuresti, Rumanio, fakso: +40-1-3122342 aŭ 3122345. La redakcio kontakteblas laŭ la adreso: Vacante in Romania, P-ta Walter Maracineanu 1-3, Ro-70711 Bucuresti, Rumanio, fakso: +40-1-6144648. (Ionel Onet)

Ĉevalino fine mamnutras sian idon

de SHAN YE


EN la homa mondo estas ŝtonkoraj patrinoj, kiuj rifuzas nutri sian bebon. En la besta mondo tiaj aferoj estas pli multaj. Printempe sur la stepo de Interna Mongolio ĉevalinoj naskas idojn. En amaso da ĉevalinoj-patrinoj troviĝas ofte unu aŭ du, kiuj post sia nasko tuj forlasas sian idon. Eĉ se oni portas la malsatan idon al ĝia patrino, por ke ŝi mamnutru ĝin, ŝi ne akceptas, sed male, ŝi mordas aŭ piedbatas ĝin. Ŝi ne ŝanĝas sian konduton, eĉ se oni forte vipas ŝin.

Sed spertaj paŝtistoj ne ĉagreniĝas pro tio. Ĉe vesperiĝo ili kondukas la malbonkondutan ĉevalinon kaj ŝian idon en dezertan valon malproksiman de vilaĝoj, alligas ŝian hufon al arbo

per ŝnuro ĉ. 10 m longa. Tiamaniere la ĉevalino povas movi sin en limigita spaco.

Noktiĝas. Subite aŭdiĝas terura hurlado de lupoj el malproksimo. La hurlado pli kaj pli proksimiĝas. Post nelonge jam vidiĝas figuro de la timiga lupoj sub pala luno. Ho, terure! La ĉevalino ekstrema. Ŝi senkonscie proksimiĝas al la ĉevalido. La ĉevalido unuafoje sentas amon de la patrino, tuj direktas sin al ŝi kaj avida suĉas ŝian mamon. Ili finfine intimiĝas.

Strange, la lupoj iradas nur ĉirkaŭ ili, sed ne ĵetas sin al ili. Fakte, tio ne estas lupoj, sed paŝtistoj vestita per besta felo. Li rampas en herbojn kaj krias kiel lupoj. Li foriras nur tiam, kiam la ĉevalino kaj ŝia ido ne plu disiĝas. ■



Pri orkideoj

de TIAN XING



Grandfolia gladiolo

Foto de LIU SIGONG

Mi ankaŭ estus interesata per artikoloj pri la naturo en Ĉinio: ĉiuj orkideoj, plantoj, fungoj, birdoj kaj papilioj.

de **RAYMOND LECAT** (Egiptio)

KIEL s-ro R. Lecat, ankaŭ multaj ĉinoj ŝatas orkideojn. La Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis en 1993 la albumon Orkideoj, kiu montras al ni la mondon de orkideoj. Kvankam ĝi plurfoje reeldoniĝis, tio ankoraŭ ne povis kovri la bezonon.

Orkideoj ravas per bonodoro

kaj diverseco de formo. Kaj krome, ĉinoj rigardas orkideon kiel simbolon de nobleco. En Ĉinio orkideo, umefloro, pino kaj bambuo estas honoritaj kiel nobluloj. Laŭ tradicia vidpunkto de ĉinoj, orkideo ne estas planto ordinara, sed spekulanto de nobla spirito kaj alta aspiro.

Ĉinio, de norde suden, kovras la zonojn glacian, mezvarman kaj tropikan kaj havas tre diversajn speciojn de orkideoj. Ĝenerale dirite, en la mondo estas 25 000-30 000 specioj de primitivaj orkideoj kun 700-800 genroj. Kun aldono de la novaj artefaritaj spe-

cioj la nombro de specioj de orkideoj estas 60 000-70 000.

Ĉinio havas 1 100 speciojn de orkideoj kun 161 genroj. Ili plejparte kreskas en la baseno de Yangzi-rivero kaj provincoj de sudokcidenta kaj sudorienta Ĉinio. En la provincoj Yunnan kaj Sichuan ili estas plej grandnombraj kaj en la provinco Taiwan ankaŭ prosperaj. Yunnan estas unu el la regionoj plej riĉaj je orkideoj en la mondo. Tie vivas pli ol 530 specioj de orkideoj kun proks. 100 genroj. Inter ili la gongshan-aj cimbidoj (*Cymbidium gongshanense*) estas nova specio, malko-

vrita fine de la 80-aj jaroj; armeniacaj pafiopedioj (*Paphiopedilum armeniacum*), propraj al Ĉinio, estas raraj en la mondo. Kaj malipoaj pafiopedioj (*P. malipoense*) estas rigardataj de fakuloj kiel la plej primitivaj tiuspece en la mondo.

La plej popularaj orkideoj de Ĉinio, kiuj havas longan historion de kultivado, estas goeringiaj cimbidoj (*C. goeringii*), kanranaj cimbidoj (*C. kanran*) kaj ĉinaj cimbidoj (*C. sinense*). Inter ili la plej valoraj estas cimbidoj, kies perianto kaj kolumno estas blankaj aŭ verdaj kaj havas neniun alikoloran makulon aŭ vejnon. Ĝenerale dirite, la supre menciitaj orkideoj ne havas okulfrapan aspekton nek grandajn florojn kaj foliojn, kiaj la tropikaj, tamen ili odoras pli agrable. Koncerne juĝon de la orkideoj, la ĉinoj alte taksas ilian odoron. Fajnaj orkideoj odoras milde kaj agrable. Por fajnaj orkideoj iliaj folioj certe konformas al ili en longeco, dikeco kaj kurbeco; tiuj, kiuj havas malhelverdajn kaj briletantajn foliojn kaj havas neniun cikatron, estas fajnaj. Ju pli da klaraj vejnoj sur la folioj havas artefaritaj orkideoj, des pli valoraj ili estas. Raraj orkideoj estas tiuj, kiuj havas sur la pintoj de folioj mallongajn flavajn kaj blankajn liniojn, alinome, vejnojn de birda beko, blankajn aŭ flavajn randojn kaj makuletojn sur la folioj, alinome, makuletojn de tigro. En 1988 okazis en Hongkong ekspozicio de orkideoj. En ĝi sensaciis la orkideo Damo. Ĝi estas malgranda kaj havas sur la mallongaj folioj elstarajn vejnojn similajn al bufa haŭto. La orkideo estas tre rara kaj ĝis nun nur du tiuspecaj orkideoj estis trovitaj.

Pro diferenco de vivkutimo, medio kaj topografio la orkideoj estas dividitaj en la kategoriojn surterajn, saprofitajn kaj epifit-

ajn. Fakte, en la naturo ĉiuj orkideoj ne povas esti dividitaj tiel klare, kiel la supre menciitaj. Iuj orkideoj de sama gento estas surteraj kaj epifitaj. La orkideoj en la zonoj mezvarmaj kaj subtropikaj plejparte estas surteraj kaj la epifitaj plejparte kreskas en la tropika zono. Saprofitaj orkideoj kreskas preskaŭ en ĉiu ajn zono. eĉ en Tibeto 5 000 m super la marnivelo.

La surteraj orkideoj, kiuj originis en la mezvarmaj zonoj, kreskas sur kampoj humidaj, sablozaj, akvo-tralasivaj kaj riĉaj je humo. Kiel ekzemple, armeniacaj pafiopedioj kreskas sur rokmuroj ĉ. 2 000 m super la marnivelo. Graminifoliaj arundinoj (*Arundina graminifolia*) kreskas ĉe rando de arbaro, en ĉerivera herbaro kaj en marĉejo, 800-2 400 m super la marnivelo.

Saprofitaj orkideoj kreskas sur mortintaj kaj putrantaj vegetaĵoj kaj asimilas el ili nutraĵon. Antaŭe, dum longa tempo oni tre malmulte konis ilin. En la lastaj jaroj oni studis pri gastrodio (*Gastrodia elata*) kaj trovis, ke ĝi vivas de akvo kaj nutraĵo el mielaj agarikoj. Por kultivi gastrodion oni fosas kavon kaj metas tuberon

de sovaĝa gastrodio en la kavon plenan de humo prenita proksime de mielaj agarikoj. Tubero de gastrodio efikas por vigligi sangocirkuladon kaj forigi doloron, precipe por kuraci doloreton en la lumboj kaj kruroj, hemiplecion, fortan kapturiniĝon kaj kapdoloron. kaŭzitaĵn de apopleksio. Poste, oni sukcesis grandaree kultivi gastrodiojn. Tiamaniere estis trovita nova vojo kultivi saprofitajn orkideojn.

Epifitaj orkideoj kreskas sur arbotrunko, ŝtono kaj rokmuro. Ili havas fortan radikaron, plejparte aŭ tute en aero, kaj asimilas akvon el ĝi kaj nutraĵon el neorganika salo solvita en pluvakvo aŭ el humo kaj organikaĵo ĉirkaŭ la radikaro. Multfloraj aeridoj (*Aerides multiflora*) en Yunnan-provinco kreskas sur arboj de la tropika zono malpli ol 1 300 m super la marnivelo. Ĉe ilia disflorado sennombraj rozkoloraj infloreskoj formas florigardenon en aero. Ke la epifitaj orkideoj kreskas en alta loko, tio evitigas al ili densan ombron sub la arbaro, tio ebligas al birdoj kaj insektoj, kiuj transportas polenon, facile trovi ilin kaj faciligas al ili porti iliajn semojn foren. ■

En butiko de freŝaj floroj

Foto de LI YUWEI





Orkideo
(*Cymbidium
longifolium*)



Orkideo (*Cymbidium eburneum*)



Pafiopedio kun tigras strioj
Foto de LANG KAIYONG



Kokcineo (*Renanthera coccinea*)
Foto de JI ZHANHE



Malgrandfolia pafiopedio
Foto de LI HUA

Hongkong iras nun al mi

Teksto de Lu Jixin
Muziko



I- ras vi al mi, ah, i- ras vi al mi.
I- ras vi al mi, ah, i- ras vi al mi.
I- ras vi al mi, ah, i- ras vi al mi.



so- i- fan- taj ko- roj o- va- ci- as vin.
de ni for- la- vi- tas na- ci- mal- ho- nor'.
en ĉi- ni- a su- do flo- ras ĉar- ma kerk'.



tra centja-raj on- doj, tra cent- ja-raj son-ĝoj,
kvin- stelfla- ga flir- to, ĉi- no- san- ga vir- to,
o- ri- en- ta per- lo, pros- per- dat- ra ver- vo,



Hongkong, Hongkong jen re- ve- nas al pa- tri- a sin'.
Hongkong, Hongkong pulsas jen laŭ Changjiang- river- bol'.
Hongkong, Hongkong i- ras al e- po- ko kun su- perb'.

Okaze de la reveno de Hongkong al la patrolando en la 1-a de julio 1997,
ĉina esperantisto-poeto Lu Jixin verkis tiun ĉi kanton por esprimi sian ĝojon.

Sur la Leŭsa Altebenaĵo

Teksto de SUN SHUQING

Fotoj de YIN HEXIAN



Forstoj en iam dezertaj lokoj ĉe la Flava Rivero


Meze de Ĉinio sterniĝas altebenaĵo kun areo de 580 000 kvadrataj kilometroj, kies 70% estas kovritaj de leŭso. Ĝi portas la nomon Leŭsa Altebenaĵo.

Vintre kaj printempe en la loko estas alta atmosfera premo. Kiam ventas tie, en la aero flugas sablo, ke la ĉielo fariĝas nevidebla. Granda kvanto da sablo moviĝas suden laŭ norda vento. Kiam la vento mildiĝas, la sablo haltas. Post centmiloj da jaroj formiĝis la Leŭsa Altebenaĵo. La dika tavolo da leŭso estas facile eroziebla. Kiam pluvegas, multaj leŭsaj pecoj estas forportitaj de fluakvo. Eĉ malgranda sulko sur la tersurfaco povas profundiĝi, pligrandiĝi kaj rapide plilongiĝi sub tiuj cirkonstancoj, kaj aperas valo profunda centojn da metroj. Sur la Leŭsa Altebenaĵo ne mankas tiaj valoj.

Ĉinio estas unu el la landoj, kiuj estas plej serioze atakataj de dezertigo. Trosekeco, sablovento, erozio, alkaligo kaj degenerado de herbejoj serioze minacas la ekonomian disvolviĝon de Ĉinio kaj la vivon de la popolo. De dekoj da jaroj la loĝantoj kulturis kampoŝirmajn forstojn laŭlonge de rivero kaj montaro. Ili disvastigis metodojn de scienca forstumado, faris teknikan trejnadon kaj alprenis diversajn rimedojn, kiaj kultivado de plantidoj en ujoj, kontraŭsekeca forstumado sur suna deklivo kaj semado per aviadilo, por kreskigi pli multe da arboj. Krom kampoŝirmaj, ili kulturis ankaŭ industriajn forstojn. Rezulte de tio, la procentaĵo de la forstumita areo kreskis de 5.05% al 9% kaj la dezertigo estis bremsita certagrade.



Ŝtuparaj kampoj konstruataj



Valo reordigita



Valo en formo de mankavo




Sur la Leŭsa Altebenajo

Akvoutiliga konstruo de Liujixia



Senfina kurejo



Tian Maijiu kaj lia studento trapasinta doktoriĝan ekzamenon

TIAN Maijiu (Tjan Maj ĝiŭ) estas la unua doktoro de sporta scienco de la nova Ĉinio. De la 80-aj jaroj ĉina sporto bone kunligas sin kun scienca esploro de sporto, kaj en tiu kampo multe ŝvitis Tian Maijiu.

Tian Maijiu, vicdirektoro de la Pekina Sporta Universitato, aspektas ne kiel profesoro de sporto. Li estas ĝentila, ne tiom forta.

Tian Maijiu estis bona atleto. 16-jara, li rompis la tutlandan rekordon de 800-metra knaba kuro. Post kiam li fariĝis profesulo, li ne forlasis la kurejon. En 1979, kiam li studis en Germanio, trafika akcidento perdigis al li la maldekstran piedon. La atako estis tre peza por li. Ĉar li estas viro kun firma volo, baldaŭ li eliris el la doloro kaj kuŝante en lito finis doktoriĝan disertacion. Kiam li

sukcese trapasis la ekzamenon, ĵurnalo de Germanio tiel taksis lin: "En du kaj duona jaroj ĉina sporta sciencisto Tian Maijiu, kiu pasigis 9 monatojn en lito, rapide finis la disertacion kaj trapasis la doktoriĝan ekzamenon. Liaj agoj kaj liaj notoj multe fierigas lin kaj lian landon."

En 1985 li ekstudis la strategion de sporta evoluo. En 1986 sub lia gvido oni finis sintezan esploradon de scienca trejnado kaj makrostrategio de serioj da sportoj. Tio donis sciencan bazon al prosperigo de ĉina sporto.

Dum verkado de disertacio li disvolvis la regulon de distanca diferenco de konkurso kaj trejnado de sportisto de mez- kaj longdistancaj kuroj al ĉiuj periodaj fortostreĉaj sportbranĉoj inkluzive de naĝo, rapid-sketado kaj jaktado. Poste li daŭre esploris.

Same kiel fortostreĉaj sportbranĉoj, multe da aliaj sportbranĉoj havas evidentan komunecon. Ekz. gimnastiko, plonĝo, artsketado kaj akrobata gimnastiko karakteriziĝas per malfacilaj kaj graciaj movoj; bokso, lukto, ĵudo kaj skermo per antagonismo de forto; tablotenis, volanludo, teniso kaj flugpilko per reto... Li science klasifikis sportajn sportbranĉojn kaj esploris la komunecon de samsporta sportbranĉo kaj rilatojn de malsamaj sportbranĉoj, tiel li prezentis novan trejnan teorion de grupo de sportbranĉoj.

La teorio, kiu havas influon sur la ĉinaj sportaj teoriistoj, estas vaste aplikata en sistema administrado de ĉina sporto kaj perfektigado de trejnado. Oni altigas la funkcion de metabolo de oksigeno en naĝo kaj mez- kaj longdistancaj kuroj kaj superregas la normon de laktacido de sango por sporto, kio estas uzata en rapid-sketado, biciklado ktp. Oni asimilas originalajn naciajn grundgimnastikajn movojn al akrobata gimnastiko kaj artsketado kaj tiel altigas la nivelon de tiuj sportoj. Estas notinde, ke post la Olimpiaj Ludoj en Barcelono Tian Maijiu ricevis unuataĝan koverton, subskribitan de ĉiuj trejnistoj kaj sportistoj de la ĉina plonĝa teamo, kun vortoj "Oraj medaloj enhavas vian meriton". Iu komparas lian vojon kun zigzaga kurejo, kie li sukcese transkuris ĉiujn barierojn. Li diris: "Kurejo estas elipsa, senfina, mi havas novan esplor-temon, mi kuros daŭre." ■

En vilaĝo de vaks-tinkturaĵoj

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

En Guizhou-provinco de sudokcidenta Ĉinio kuŝas malgranda montvilaĝo. Tie, ĉu sur montoj ĉu apud riveroj, abundas ŝtonoj. Tial la vilaĝo nomiĝas Ŝtona Vilaĝo. La buji-aj loĝantoj de la vilaĝo konstruas domojn el ŝtonoj kaj pavimas stratojn el ŝtonetoj.

La vaks-tinkturita ŝtofo, farita de buji-oj, havas longan historion kaj ĝuas renomon kiel bela metiartaĵo. Cirkulas legendo pri vaks-tinkurado: Antaŭ tre longe iu bela knabino de la Ŝtona Vilaĝo estis tinkturanta ŝtofon, kaj subite flugis al ŝi abelo, kiu lasis vakson sur la blankan ŝtofon. Kiam la ŝtofo estis blue tinkturita, restis sur ĝi io blanka. La knabino trovis, ke vakso estas tinktur-imuna, kaj inventis vaks-tinkturadon.

Por pretigi vaks-tinkturitan ŝtofon necesas likvigi vakson kaj trempi bambuan lameton en la likvaĵo por fari desegnojn sur blanka ŝtofo. Poste, oni metas la ŝtofon en tinkturon kaj plurfoje faras tinkturadon, por ke ĝi fariĝu blua. Kaj poste necesas lavi kaj sekigi la vaks-tinkturitan ŝtofon, antaŭ ol brogi ĝin por forigi la vakson sur ĝi.

Oni diras al mi, ke tiuj knabinoj, kiuj ne kapablas fari vaks-tinkturadon, ne estas amataj de junuloj. Tial, la buji-aj knabinoj eklernas vaks-tinkturadon en aĝo de dekkelkaj jaroj kaj iom post iom perfektigas la teknikon.



En strateto




“Aĉetu ĝin kiel memorajon!”

Vaks-tinkuritaj ŝtofoj





Patrino instruas vaks-tinkturadon al sia filino.



Ŝtona Vilaĝo

Desegnado sur ŝtofo



Protekti niajn kunulojn

EN antaŭurbo de Pekino mi vidis kvietan mondon: cignoj gracie naĝas en lago, kiangoj gaje petolas sur sabla tero, budorko (*Budorcas taxicolor*) lante montriĝas malantaŭ monteto... En la arbaro estas pli vigla etoso: orharaj simioj ludas per arbobranĉoj, blanklipaj cervoj postkuras unu alian, diversaj raraj fazanoj paradas per sia belaj plumoj aŭ ĝuas sunbanon...

Ĉi tie ne estas ordinara zoologia ĝardeno, sed la Pekina Centro por Protekto de Pereontaj Bestoj, kie oni laboras por savi kaj esplori la bestojn, kiuj alfrontas pereon, kaj por alvoki pli da amo al la bestoj — niaj kunuloj.

Montetoj, dezerto, humida tero kaj arbaro, ĉio ĉi formis artefaritan medion en la centro kaj donis taŭgajn kondiĉojn al la tieaj pli ol 1 000 bestoj de kvindek specioj. Laborantoj de la centro klarigis, ke tiel ne nur la bestoj povas vivi libere, sed ankaŭ la vizitantoj havas la ŝancon koni la ekologian medion.



Tiu neĝleopardo vivis en la centro jam tri jarojn. Ĝi, kvankam juna, havas mirindan travivaĵon: Ĝi estis kaptita de ŝtel-ĉasistoj, iu turisto savis ĝin, poste la Ĉina Besto-Protekta Asocio veturigis ĝin de la malproksima okcidenta altebenaĵo al Pekino. Tiam ĝi estis malpli-ol-unu-monata kaj aspektis kiel kateto. Nun ĝia korpo longas pli ol unu metron. Kiam mi venis al ĝia loĝejo, ĝi saltis kaj kuris ludante kun la turistoj, de tempo al tempo ĝi sin apogis sur la latiso, por ke oni gratu ĝian dorson. Vidinte tion, mi demandis s-ron Guo de la centro: “Se ĝi estos longe bredata kaj intimiĝos kun homoj, ĉu iam perdiĝos ĝia sovaĝeco?” Li jesis: “Tio ja estas problemo, pri kiu ni studas.” Li aldonis, ke bredado de la neĝleopardo estas tamen bona maniero por studi kaj koni ĝian vivon. La Monda Neĝleoparda Asocio tre kontentas pri la nuna stato de la neĝleopardo kaj promesis donaci neĝleopardinon al la centro. Nun la “fraŭlo”

atendas sian “fianĉinon” el Seattle de Usono.

S-ro Qi, specialisto pri orhara simio, klarigis, ke en la centro oni studas la naskon de orhara simio, ĉar la procentaĵo de vivipovaj orharaj simioj estas tre malalta, kaj la premio por la nasko de orhara simio estas duoble pli granda ol tiu por la nasko de pando.

S-ro Qi elvokis kelkajn orharajn simiojn el ilia loĝejo. La etaj ĉirkaŭis lin, kriante serĉis ion en lia poŝo kaj tiris lian kolumon. Qi kun rideto donis arakidajn grajnoj al ili, kiuj poste iom kvietiĝis. Plenkreska simio Jiuer estas “reĝo”, de tiuj simioj. Antaŭ 10 jaroj, kiam fondiĝis la centro, ĝi suferis de hepata tumor. Oni portis ĝin al la centro. Ĝi estas feliĉa, ĉar en la centro ĝi havas tri “edzinojn” kaj ses “gefilojn”, se en la natura medio ĝi ne povus vivi ĝis nun. Antaŭ unu semajno naskiĝis la plej juna ido de Jiuer. Nun la simieto estis scivoleme rigardanta en la sino de sia patrino. Por ĝia sekura naskiĝo, Qi kun siaj kolegoj deĵoris tutajn noktojn esplorante kaj notante la staton de la graveda simio. Ili povas antaŭkalkuli la precizan daton de akuŝo, tamen neniom malstraĉas eĉ plej malgrandan atenton al flegado de la gravedaj simioj. Qi diris kun rideto: “La nombro de orharaj simioj en nia centro kreskis de 11 al 33.” Tiam iu simio-patrino kombis al li la harojn kaj lekis lian kapon, kaj Qi sentis tion kiel kutime.

En la centro estas tombejo por la pereintaj besto-specioj. Laborantoj de la centro diris al mi, ke laŭ studo pri fosilio, besto-specio pereas post centmiloj aŭ eĉ milionoj da jaroj en naturaj kondiĉoj, sed post kiam la homaro eniris la industrian epokon, la rapideco de la pereado altiĝis je mil aŭ eĉ miloj da obloj. La fakto avertas nin, ke ni ne forgesu ke bestoj estas niaj kunuloj, kaj ni devas multe ami kaj protekti bestojn, se ni deziras protekti nian vivmedion. ■



Xinjiang kaj la Silka Vojo



Teksto de SUN AIJUN
Fotoj de LIU SIGONG kaj HENG YANGPING

KIAL en Dunhuang konstruiĝis Mogao-ŝtonkavernaro kun multnombraj budhostatuoj? Unu el la kialoj kuŝas en tio, ke la tiamaj komercistoj vojaĝontaj al Xinjiang (Ŝingĵang) devis tie benopeti de la Budho bonvojaĝon sur la senlima dezerto okcidente. Hodiaŭ la situacio tute aliĝis: Oni povas veturi al Xinjiang per ŝoseo, fervojo kaj aervojo. Nun oni bezonas pli ol 3 horojn por flugi de Pekino al Urumĉi (Urumĉi), ĉefurbo de Xinjiang. Do, Mogao-ŝtonkavernaro ne plu estas ekirpunkto por vojaĝantoj al Xinjiang, sed kiel arta trezorejo, ĝi fariĝis fame kona-


ta vidindejo.

VOJAĜO EN AVIADILLO

Sidante en komforta kaju-

to, mi foliumis albumon pri la Xinjiang-a Civil-aviada Kompanio. Mi informiĝis, ke antaŭ 12 jaroj ĝi havis 10 aerliniojn

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





En kajuto



Sekura aviado

En la Flughaveno de Urumqi





La Flughaveno de Urumqi en mateno



Maljuna pasaĝero helpata


kadre de Xinjiang. Por disvolvi siajn aviadistajn grupojn, en 1985 la Xinjiang-a Civil-aviada Kompanio sendis siajn teknikistojn lerni en Sovetunio kaj Kanado. En la sekvantaj jaroj ĝi malfermis ne nur 24 enlandajn aerliniojn de Urumqi al Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj 18 urboj kaj turismaj vidindejoj, sed ankaŭ internaciajn aerliniojn al Kazahŝtano, Uzbekstano, Rusio, Pakistano kaj aliaj landoj. La Xinjiang-a kompanio posedas pasaĝerajn aviadilojn kun 2 676 sidlokoj, ĝiaj aerlinioj longas sume 49 000 km kaj ĝiaj flugfojoj estas pli ol 200 ĉiusemajne.

Matene de la sekvanta tago, antaŭ leviĝo de la suno, mi venis en la aerodromon de la Xinjiang-a Civil-aviada Kompanio. Sur la vasta parko estis flugontaj dekelkaj aviadiloj kun la emblemo Luno kaj Cigno sur la empeno, kiu simbolas sekurecon kaj feliĉon. En la suda parto de la aerodromo nova hangaro estis en konstruado kaj en la norda etendiĝis nova 3 600-metra kurejo. Nun estas konstruata alia atendejo kun areo de 45 000 kvadrataj metroj.

En pasaĝera aviadilo flugonta al Changsha, ĉefurbo de Hunan-provinco, mi babilis kun ujugura ĉefpiloto Aili. Li diris: "Mi havas ĵipon, sed mi neniam kuraĝas libere veturigi ĝin sur trafikovigla ŝoseo. Kiam mi stiras aviadilon, mi sentas, ke mi, rajdante surazene, paŝtas ŝafojn." Kvankam tiu ĉefpiloto, unu el la plej spertaj nacimulplimultaj pilotoj, aĝis 40 jarojn, tamen li aviadis 23 jarojn. De li mi informiĝis, ke en la Xinjiang-a Civil-aviada Kompanio laboras pli kaj pli da nacimulplimultaj pilotoj, ste-



Ĉefpiloto Ai Li kaj lia edzino



En manĝaj-strato

vardinoj kaj surteraj servistoj.

BRANĈOJ DE LA SILKA VOJO

La Silka Vojo havas pli da signifoj historiaj kaj kulturaj. Dum esplorado pri ĝi oni tro-


vis, ke multaj ĝiaj partoj variis en malsamaj historiaj periodoj. En Xinjiang ĝi havas la branĉojn sudan, mezan kaj nordan. Nia vizito komenciĝis de la norda branĉo. Tamen, la nuna kaj la historia iom diferencas inter si.



▲Parto de Urumqi

▼Nova strato





Ujguraj maljunuloj



Rostado de ŝafajo



En butiko de
Xinjiang-aj tapiŝoj

Laŭ historia noto, la norda branĉo de la Silka Vojo en Xinjiang iras de oriente okcidenten laŭ la norda piedo de Tianshan-montaro. Antaŭ 1 000 jaroj la kortego de Tang-dinastio (618-907) starigis la gubernatoran ĉefstabejon Beiting en Tingzhou (Jimsar-gubernio de la nuna Xinjiang). Tio garantiis la sekurecon de la Silka Vojo norde de Tianshan-montaro kaj prosperigis komercadon kaj ekonomion de la loko. Kiel grava urbeto en norda Xinjiang, Tingzhou estis staplejo sur la Silka Vojo. Laŭdire, la poŝta vojo en Tingzhou estis sufiĉe larĝa siatempe. En Urumqi mi informiĝis, ke Jimsar estas nun malgranda guberniurbo. Do, pro kio ĝi dekadencis?

Kun tiu demando mi intervjuis s-ron Xu Baicheng, kiu bone studis pri la Silka Vojo. Li sternis antaŭ mi la de li desegnitajn mapojn kaj diris, ke la norda branĉo de la Silka Vojo en Xinjiang, kiu transiris la orientan parton de Tianshan-montaro 3 000-4 000 m super la marnivelo, etendiĝis ĝis Tingzhou norde de la montaro. La norda branĉo estis plena de koto somere kaj de neĝo vintre. Por atingi Tingzhou necesis longa preteriro. Tio kostis al la vojaĝantoj ankoraŭ pliajn tagojn. Je tio li demandis min, ĉu la montvojo estis facile irebla por komercistoj-vojaĝantoj kun peza ŝarĝo, ĉu ĝi povis prosperigi la Silkan Vojon en Tang-dinastio.

S-ro Xu konigis al mi alian nordan branĉon de la Silka Vojo, t.e., la branĉon Baishuijian (Bajŝujĝjan). Almontrante la mapojn, li diris al mi, ke ĝi, kiu transiras Tianshan-montaron, ricevis la nomon surbaze de Baiyang-rivero el akvo de degelinta neĝo sur la montaro. Ĝi estas glata kaj rekta, kun longo de 150 km. Apud ĝi kuŝas multe da lagoj

kaj fontoj, kaj krome, ankaŭ historiaj restaĵoj, kiaj la antikva urbo Luntai, unika imposta urbo ĉe la norda branĉo de la Silka Vojo historie, ruino de alarm-turoj kaj ruino de 4 antikvaj urboj. Laŭ naturaj kondiĉoj kaj historiaj studoj, la branĉo Baishuijian estis preferata ol aliaj. Li daŭrigis, ke Tingzhou, kiel grava urbo politika kaj milita historie, eble ludis gravan rolon en la unua etapo post la lanĉo de la norda branĉo de la Silka Vojo en Xinjiang, sed la branĉo Baishuijian anstataŭis ĝin post nelonge kaj de tiam la komercado vigliĝis.

S-ro Xu estas emerito. Antaŭe li laboris kiel inĝeniero de kemi-industria fabriko. Ĉiutage, kiam li iris al laboro, li pasis preter Luntai. Dum pli ol 30 jaroj li sin okupis pri studo pri la antikva urbo. En 1995 li metis novan tezon pri la norda branĉo de la Silka Vojo, kiun aprobis koncernaj fakuloj.


URUMQI EN VESPERO

Urumqi signifas “belan paŝtejon”. Ĝi situas inter 2 montoj kaj ĉe rivero. Antikve, kiam la Silka Vojo prosperis, tie etendiĝis vasta stepo. En la baseno de Urumqi-rivero nomadoj vivis de paŝtado. Hodiaŭ, Urumqi havas 1.52 milionojn da loĝantoj el 43 nacioj. Post la lanĉo de la Fervojo inter Lianyungang, Ĉinio, kaj Roterdamo, Nederlando, en 1990, Urumqi fariĝis trafika nodo internacie.

Mi pasigis mian infanaĝon en Xinjiang, kaj poste, mi forlasis ĝin por lerni kaj labori en Pekino. Mi devis ŝanĝi aŭtobuson en Urumqi por veturi al mia hejmloko. Dum la pasintaj pli ol dek jaroj, ĉiufoje,

kiam mi revizitis la urbon, min profunde impresis ĝiaj preterirejoj, aŭtovojoj trefokruĉigoj, uĝguraj knabinoj, kies harligoj estas anstataŭigitaj per haroj pendantaj malsupren ĝis la ŝultroj. Mi rimarkis ankaŭ, ke nokte en Urumqi regas plena lumo, aŭtoj kuras sur ŝoseoj, neonlampoj bunte brilas ekster luksaj hoteloj kaj amuzejoj kaj vesperfoiroj viglas ĉe stratoj.

Vespere, sur la centra placo multaj homoj, inkluzive de maljunuloj, faris gimnastikajn ekzercojn. En la alia parto de la placo oni dancis en akompano de muziko. Kaj la dancantoj plejparte estis mezaĝuloj. En la lastaj jaroj nemalmultaj urbanoj de Ĉinio dancis sub libera ĉielo. Tamen mi ne atendis, ke ankaŭ en tiu fora okcidenta urbo viglis granda nombro da dancantoj. Najbare de la placo movoplenis vesperfoiro frekventata de gejunuloj. Ambaŭflanke de la strato staris butikaj budoj unu apud alia, kiuj provizis klientojn per manĝaĵoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj. Tie ĝueblis ne nur rostaĵoj, ŝafaĵsupo kaj rizo kun gusto de Xinjiang, sed ankaŭ diversaj manĝaĵoj el aliaj lokoj de Ĉinio. Mi manĝis rizon supre diritan ĉe budo de huj-voj. La 40-jara mastro diris al mi: “Mi kaj mia edzino vojaĝis en aliaj lokoj. Ni trovis, ke Urumqi-anoj estas pli serenaj kaj honestaj. Ili manĝas viandon en grandaj pecoj, trinkas vinon el granda bovlo kaj vivas en gajeco.” ■



Kiel Pekino traktas rubon?

Teksto de **JI PING**
Fotoj de **GUO WEIDONG**

ANTAŬ 2 jaroj Liu venis en Pekinon kaj eklaboris kiel purigisto. Ĉiutage, en frua mateno li komencas sian laboron: kolekti rubon el 26 rubŝaktoj de 8 loĝdomoj kaj transporti ĝin al proksima hermetika rubdomo. Posttagmeze li laboras en alia strateto. Je tintado de lia sonorilo, oni eldomiĝas kaj ŝutas rubon en lian ĉaron. Li transportas la rubon al rubdomo kaj ŝutas ĝin en konteneron. Laŭdire en Pekino laboras nun dekoj da miloj da purigistoj.

Pri la rubdomo, kiun Liu frekventas ĉiutage, zorgas Xie. Li diris al mi, ke en 1949, kiam naskiĝis la nova Ĉinio, estis 31 rubejoj en la kvartaloj de Pekino. Tiam ĉiujare oni forĵetis pli ol 2 milionojn da tunoj da rubo. En la loko, kie ĉarmas nun la parko Dongdan, siatempe estis amase-

go da rubo. Iniciatite de la urba registaro pekinanoj faris balaadon dum sinsekvaj 91 tagoj. En tiuj tagoj oni transportis rubon kaj aliajn malpuraĵojn de kvartaloj al malproksimaj antaŭurboj sen ilin trakti. Nemalmultaj pekinanoj bone scias, ke la loko, kie estas nun la Kvartalo de Azia Sport-Kunveno, estis subĉiela rubejo antaŭ ĉ. 20 jaroj. Kiam oni komencis konstrui domojn en la loko, la rubo estis transportita pli malproksimen.

Nun en Pekino rubo pli kaj pli multiĝas. Xie diris al mi, ke la rubdomo, pri kiu li zorgas, entenas rubon el la ĉirkaŭaj lokoj je 2 km distancaj de ĝi. Oni kontenero transportas rubon al malproksima antaŭurbo. Ĝenerale dirite, oni devas transporti ĉiutage 10 kontenerojn ĉiu kun 5 tunoj da rubo kaj iam — 15-16 kontenerojn.

Nun, en Pekino estas pli ol 600 similaj rubdomoj, kie kolektiĝas 70% de la urba rubo.


Materialo de la Pekina Administracio de Media Higieno montras, ke en la lastaj jaroj ĉiutage oni transportis 12 mil tunojn da rubo el la kvartaloj de Pekino. En somero kaj vintro — 16 mil tunojn, ĉar somere oni manĝas multe da akvomelonoj kaj vintre oni forigas putrajn foliojn de pli da brasikoj por konservi ilin hejme. Nun en la 6 400 rubejoj ĉirkaŭ Pekino estas almenaŭ 100 milionoj da tunoj da rubo, kaj plie, tiu kvanto kreskas ĉiujare je 2-3%.

La amasegoj da rubo ĉirkaŭ la urbo ne nur okupas grandan areon da kampo, sed ankaŭ fermentas, malkomponiĝas kaj putras, kio estigas malutilajn gasojn kaj eĉ metanan eksplodon.

En la orienta antaŭurbo de Pekino mi vizitis subĉielan rubejon je duonkilometro for de iu vilaĝo. Somere tie svarmas moskitoj kaj muŝoj, la rubo naŭze malbonodoras. Oni devigite forbruligas ĝin foj-foje.

La senpolucia traktado de urba rubo estas komuna problemo alfrontata de multaj landoj en la mondo hodiaŭ. Por solvi ĝin, diverslandaj sciencistoj kaj mediprotektantoj multe cerbumadis. Por utiligi rubon kaj redukti ĝian malutilon al la urba medio kaj popola vivo, ankaŭ Pekino faris grandan penadon.

Antaŭe en la gubernio Changping de Pekino estis subĉiela rubejo. En 1994 oni konstruis tie modernan rub-konservan kavon kun areo de 60 hektaroj kaj pro-



Rubtransporta stacio en antaŭurbo de Pekino



En komputila regadejo de la rubtransporta stacio

fundo de 10 metroj. Funde de la kavo estas dika likimuna tavolo kun drentubo de rublikvaĵo kaj 32 tuboj de metano. Ĉiutage ĝi povas trakti 2 000-3 000 tunojn da rubo.

Oni transportas rubon tien kaj disŝutas ĝin tavolon post tavolo kun diko de 2 metroj. Oni ebenigas, firme premas ĉiun tavolon, disŝprucigas sterilizan substancon. Supozeble, ke post 8 jaroj la rubkonserva kavo transformiĝos en monteton altan je 40 m. Sur ĝi oni plantos arbojn kaj la loko fariĝos parko.

Inĝeniero de la Pekina Administracio de Media Higieno diris al mi, ke por kiel eble plej rapide malaperigi la fenomenon, ke rubo ĉirkaŭas la urbon, estas necese konstrui kelkajn rubkonservajn kavojn. Tia traktado de rubo estas tempoŝpara kaj facila en tekniko, kaj plie la tero povas esti denove utiligata. Tia rimedo estas nun uzata ankaŭ alilande.

Administrantoj de media higieno scias, ke rubo estos utila, se oni uzos ĝin. Nun 50% da rubo de Pekino estas utiligeblaj, inkluzive vitron, metalon, paperon, plaston, vaton, tolon ktp. Rubo


entenas grandan kvanton da energio. Se oni konstruos elektrejon, utiligante rubon de 600 tunoj ĉiutage, la elektrejo produktos ĉiujare 7.52 milionojn da kWh da elektro.

Antaŭ nelonge en montvalo de Shijingshan (Ŝiĝingŝan)-distrikto de Pekino ekfunkciis fabriko, kiu faras sterkon el rubo. Kun aŭtomataj instalaĵoj, ĝi neniom impresas kiel fabriko, kiu traktas

ĉiutage pli ol 400 tunojn da rubo. La de ĝi produktita organika sterko atingis ŝtatan normon. Ĝi estas multe ŝatata de kamparanoj. Tiu tekniko estos utila al rubotraktado en Ĉinio, se ĝi estos aplikata landskale.

En antaŭurbo de Pekino funkcias ankaŭ alia fabriko, kiu ĉiutage forbruligas 500 tunojn da rubo. Laŭdire la skorio vomita de la fabriko estas bona konstrumaterialo. Oni povas fari el ĝi brikon, betonon ktp...

Oni diris al mi, ke en 1996-2000 en Pekino konstruiĝos 6 grandaj rubkonservaj kavoj, 4 centroj por sinteze utiligi eluzitajn materialojn, 3 sterkaj fabrikoj kun rubo kiel krudmaterialo kaj 2 rubaj elektrejoj. Nun estas streĉe konstruataj 2 rubkonservaj kavoj kaj koncernaj rubtransportaj stacioj, kune investitaj de Germanio kaj Ĉinio. Krome, estas konstruataj ankaŭ moderna sterka fabriko, kiu traktos ĉiutage 400 tunojn da rubo, kaj rubkonserva kavo, al kiu oni transportos ĉiutage 1 500 tunojn da rubo. En 2000 60% da rubo de Pekino estos senpolucie traktataj. ■



Kuracisto: "Ho, terure! La fetu tusas."
Karikaturo de WANG FUYANG



Revizito al paŝtejo en Qinghai

de GUO HONG



Loĝdomo de paŝtistoj

POST plurfoja vizitado al paŝtejoj en la provinco Qinghai (Ĉinghaj), okcidenta Ĉinio, mi pretendis esti granda konanto de la lokoj. Tamen, kiam mi kun miaj amikoj refoje faris viziton al la Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco Haibei, mi trovis ĝin fremda pro siaj grandaj ŝanĝiĝoj.

BRIKAJ LOĜDOMOJ ANSTATAŬIS TENDOJN

“Ne plu estas tendoj sur la stepo!” Ŝajnis, ke je la surpriza

krio de mia amiko mi rimarkis, ke ĉiuj tendoj el bova felo en nigra koloro ŝvelintaj en vento malaperis sur la stepo kaj ilin anstataŭis brikaj loĝdomoj en ruĝa koloro.

Ni iris en malgrandan korton, en kies norda parto sidas domo el 3 ĉambroj, la meza servas kiel salono kaj la ambaŭflankaj kiel dormoĉambroj de la gepatroj de la mastro. La flankaj domoj estas loĝataj de la mastro, lia edzino kaj iliaj infanoj kaj tiu en la nordokcidenta an-

gulo de la korto servas kiel tenejo. Nin vidinte, la mastrino gaje bonvenigis nin al la salono kaj regalis nin per teo. Sur la forno sidis tekruĉo brila, el kiu ŝprucis vaporo, kio rememorigis min pri la pasinteco, ke oni larmis pro densa fumo dum kuirado per brulligno.

“Kiu plaĉas al vi, tendo aŭ brika domo?” mi demandis.

“Brika domo, kompreneble! Ĝi estas granda, hela kaj komforta...” ŝi respondis.

“Ĉu vere oni ne bezonas ten-

don?”

“Ĉu eblas?” kun rideto ŝi demandis anstataŭ respondi. “Vi urbanoj loĝas ankoraŭ en tendo dum ekskurso, ĉu ne?” Ŝi klarigis al mi: “Antaŭe tie, kie ni paŝtis, ni starigis tendon, kiu servis al ni kiel loĝejo. Sed nun ni uzas tendon somere, kiam ni paŝtas aliloke.”

Qinghai estas unu el la 4 grandaj paŝt-regionoj de Ĉinio. Ĝiaj ĉefaj paŝtejoj troviĝas en 6 naci-aŭtonomaj subprovincoj, inkluzive la Tibet-nacian Aŭtonoman Subprovincon Haibei. La ŝanĝiĝoj similaj al tiuj en Haibei okazis ankaŭ en la aliaj paŝtejoj de la provinco, mi pensis.

RIĈIGO PER VENDADO DE ŜAFOJ

Aroj kaj aroj da ŝafoj sin paŝtantaj sur vasta stepo similis al nuboj ŝvebantaj en la ĉielo. De miloj da jaroj paŝtistoj havis komunan revon: “Familio posedu tendon, kun multaj ŝafoj.” La multeco de ŝafoj estas rigardata kiel simbolo de riĉeco de paŝtistoj. Sed tiufoje mi rimarkis, ke la ŝafaroj multe reduktiĝis kompare kun tiuj en la pasintaj vintroj. Pri tio ni demandis kelkajn paŝtistojn. Ili respondis kun rideto: “Tio estas normala, ĉar ni vendis pli da ili!”

Pro nia sinsekvo da demandoj juna paŝtisto Gong Bao rakontis, ke en printempo li bredis pli ol 500 ŝafojn, en somero li paŝtis kaj grasigis en mallonga tempo aparte virŝafidojn kaj feblajn ŝafojn, kiuj poste vendiĝis altpreze. Venis vintro, restis al li nur 400 ŝafoj, kiuj travintris en varma stalo. Preskaŭ 60% de tiuj stalantoj estis inoj, kiuj naskos idojn en la sekvanta printempo. Li daŭrigis, ke en la pasinta jaro li unufoje vendis tiom multe da ŝafoj post plurjara bredado en tia

maniero, kaj ankaŭ liaj najbaroj faris la samon.

Grandkvante vendi ŝafojn estis neimageble por paŝtistoj antaŭe. Tiam iuj paŝtistoj havis malfacilon zorgi pri multaj ŝafoj en stalo. Krome, pro manko de furaĝo kaj furiozeco de neĝoŝtormo nemalmultaj brutoj mortis. Eĉ en tia situacio paŝtistoj ne volis vendi ilin.

Nuntempe, paŝtistoj ŝanĝis sian koncepton — sin riĉigi per vendo de ŝafoj anstataŭ konservi ŝafojn kiel riĉaĵon. En la lastaj jaroj ĉiu paŝtista familio en Haibei vendis ĉiujare trionon de siaj ŝafoj, ĉar ili opiniis, ke rapida vendo alportas pli da riĉaĵoj.

KONSUMADO

“Tiu foto estis farita en Pekino kaj tiu ĉi en Ŝanhajo,” Cairang Zhuoma (Cajĵang Ĝuoma) montris la fotojn sur muro. Neatendite, tiom da lokoj vizitis tiu ordinara knabino de la stepo.

De la lastaj jaroj paŝtistoj ŝatas turisman vojaĝon, kvankam tio postulas grandan monsumon. Cairang Zhuoma diris al ni, ke en la pasinta jaro la pokapa enspezo de ŝia subdistrikto superis 2 000 juanojn, kaj ŝia patro Cuoride diris, ke ilia familia elspezo por ĉiutage vivo estis ne granda en la pasinta jaro, ĉar la tuta familio el 6 anoj manĝis viandon de ŝafoj kaj bovoj breditaj de ili mem. Ili aĉetis nur 500 kg. da fruktoj kaj legomojn ĉiutage bezonatajn. Nuntempe ilia familio preskaŭ ne kudras ledajn vestojn nek aĉetas ornamaĵojn orajn kaj arĝentajn.

Dum multaj jaroj paŝtistoj preferis bele sin vesti kaj porti juvelojn ol preni riĉajn manĝaĵojn. Ofte ili multe elspezis por virinaj ledaj vestoj kaj ornamaĵoj oraj kaj arĝentaj. La familio de Cuoride jam sin liber-

igis de la tradicia konsumado.

“Ĉu vi ne opinias, ke virinoj sen juveloj aspektas mizere?” mi demandis.

“Tio ne gravas. Riĉeco dependas ne de ŝajno, sed de gajno,” li respondis kun rideto.

Por gajni pli multe, Cuoride kaj liaj familianoj uzis sian enspezon plejparte por la konstruado de la stepo. Li diris: “Se oni volas multe postuli de la stepo, oni ne devas damaĝi elspezi por ĝi.” Li kalkulis per fingroj, kiom ili elspezis por konstrui varman stalon por brutoj, rekonstrui herbokultivejon, kulturi herbojn, enkonduki akvon ktp. En la pasinta jaro ili konsumis por tio pli ol 10 000 juanojn. Kompreneble, ili ankaŭ deponis iom da mono, por ke la plej juna filo lernu en universitato. Li daŭrigis kun emocio: “Se ni ne ‘investas’ por edukado, ni ne povos prosperigian familion.” Li impresis min per malproksimvideco.

Adiaŭinte Cuoride, ni vizitis la familion de Gexi (Geŝji) ne malproksime. En lia libroŝranko troviĝis “Tibeta-hana Vortaro”, “Tibeta Antologio” kaj aliaj libroj. La 40-jara Gexi diris al ni, ke en sia infaneco li ekŝatis tibetan folkloron, sed li ne havis tempon legi antaŭe pro nomadismo. “Nun ni bredas ŝafojn en herbokultivejo. Tial ni estas liberaj.” Do, li havas tempon denove legi kaj skribi. De li ni informiĝis ankaŭ, ke la nunaj paŝtistoj havigis al si pli kaj pli multe da tempo. Do, multaj el ili, krom aŭskulti radioelsendon kaj televidi, ankaŭ sin returnis al sia ŝatokupo antaŭlonge forlasita. Krome, nemalmultaj paŝtistoj, profitante de la libera tempo en vintro, iris al guberniurbo aŭ ĉefurbo de la subprovinco por lerni en kurso pri brutobreda scienco. Gexi jam finis sian lernadon en guberniurbo. ■



Por bon

de SUN AIJUN

En Ĉinio cirkulas popoldiro “geedziĝo kaj entreprenado de kariero”. Tio montras, ke laŭ la tradicia koncepto de la ĉina popolo “geedziĝo kaj entreprenado de kariero” estas tre gravaj en la homa vivo. Antaŭe, geedziĝo okazis ofte antaŭ entreprenado de kariero. Fakte, hodiaŭ la unua afero por ĉinaj gejunuloj, post kiam ili sin liberigis el la gepatra kaj lerneja patronado, estas trovi konvenan okupon. Do en kiu aĝo ĉinaj gejunuloj komencas serĉi okupon? Kia okupo al ili plaĉas kaj per kiu kanalo ili serĉas ĝin?

Suno

ELEKTO EN LA AĜO DE 16 JAROJ

En Ĉinio la geknaboj ekvizitas elementan lernejon en la aĝo de 7 jaroj. Post 6 jaroj ili eniras en malsuperan mezlernejon por 3 jaroj. Oni finas la devigan edukadon al ili en ilia aĝo de 16 jaroj, kiam ili posedas bazajn sciencojn de naturaj sciencoj, tamen ankoraŭ ne havas kapablon por laborado. Parto de ili volas plu lerni en supera mezlernejo por studi en altlernejo post 3 jaroj. Kaj la aliaj volas labori kiel eble plej baldaŭ. Kompreneble antaŭ sia eklaboro ili devas esti trejnataj en teknika kolegio 2-3 jarojn, ĉar en Ĉinio oni ne enoficigas junulojn malpli-ol-18-jarajn.

La teknika klerigado en Ĉinio ekpopulariĝis en la 80-aj jaroj de la 20-a jc. Kun la ekonomia disvolviĝo Ĉinio bezonas multajn teknikajn laboristojn, tial la teknika klerigado fariĝis plej facila rimedo por rapide elbaki la bezonatajn laboristojn. Nun en Ĉinio funkcias 18 600 tiaj kolegioj kun 10 milionoj da lernantoj. Pli ol duono de la diplomitiĝintoj el la malsuperaj mezlernejoj estas trejnataj por la de ili preferataj laboroj

kaj fakte la ekzistantaj teknikaj kolegioj ne povas kontentigi la socian bezonon, tial la gejunuloj de tiuj kolegioj povas facile trovi okupon post sia diplomitiĝo.

En Ŝanhajo estas 300 teknikaj kolegioj, kiuj donas klerigadon por 500 fakoj. Ĉiujare el ili diplomitiĝas pli ol 50 000 gejunuloj. Ili kun fakaj sciencoj estas kapablaj por multaj laboroj. Kaj pro tio pli ol 95% de ili povas facile trovi okupon. La Teknika Kolegio de Yichang, Hubei-provinco, estas destinita por kulturaj agrikulturajn laborantojn. En la kolegio oni instruas kulturadon de fruktaroj, teo kaj akvaj produktaĵoj, brutobredadon, bestkuracadon, forstokulturon kaj agrikulturan mekanikon, sume 5 fakojn el 33 teknikaj programoj. Fininte la lernadon en ĝi, gejunuloj fariĝis novtipaj kamparanoj kun aparta tekniko, kapablaj en entreprenado kaj administrado. Diplomitiĝinte en 1990 el tiu kolegio, Gao Yunfeng kaj aliaj 11 lernantoj laŭkontrakte luis vastan dezertan kampon proksime de la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero kaj tie konstruis ekologian farmobienon, starigis orangĝ-gardenon kun 13.3 hektar-

oj, konstruis unu porkejon kaj unu fiŝ-cisternon kaj plie ili laŭkontrakte prenis sur sin la taskon por eksperimente utiligi senmovan akvon de la akvokonservejo de la Tri Gorĝoj. Ilia laboro donis ne nur grandan profiton, sed ankaŭ bonan ekzemplon, kiun sekvas proksimaj kamparanoj.

STUDENTOJ, NE PLU SENZORGAJ

Ne ĉiuj diplomitiĝintoj el la superaj mezlernejoj povas eniri en altlernejojn. Kiuj ne sukcesis en la enira ekzameno, tiuj devas lerni ian teknikon por la estonta laboro. En la pasinteco la studentoj estis senzorgaj, ĉar la ŝtato enoficigis ilin post ilia diplomitiĝo. Sed en la lastaj jaroj la situacio ŝanĝiĝis. Ĉiujare en Ĉinio diplomitiĝas el altlernejoj ĉ. 900 000 gejunuloj, inter kiuj estas ankaŭ nombro da esplorstudentoj. La ŝtato ne povas enoficigi ilin ĉiujn, kaj la disvolviĝo de la merkata ekonomio donas al tiuj gejunuloj ŝancon laŭvole elekti okupon.

En tiuj okazoj ĉiuj junaj homoj zorgas pri sia estonta okupo tuj post sia studentaĝo kaj en la

a okupo

lasta jaro de sia studenta vivo ili, kun peticio por dungigo, komencas klopodi por sia okupo. Por akceli la reciprokajn elektojn de la studentoj kaj entreprenoj, la altlernejoj de Pekino kaj dungantoj okazigas kunvenon por rekomendo kaj dungo en ĉiu jarfino kaj ĉiu jarkomenco. Kompreneble, la studentoj povas sin proponi al la dungagentejo.

Pro granda bezono de la socio, ĝenerale gejunuloj diplomitiĝintaj el superaj lernejoj kaj teknikaj kolegioj povas trovi okupon, sed estas ne tiel facile trovi la de ili preferatan okupon. Pro malsameco de la fakoj, iuj estas urĝe bezonataj de la dungantoj, dum aliaj malfacile trovas konvenan okupon. Nuntempe la merkato urĝe bezonas fakajn laborantojn kun scioj de praktikaj sciencoj kaj teknikoj kaj la personoj, kiuj sin okupas pri studo de bazaj teorioj de literaturo, historio, filozofio k.a., ofte renkontas malfacilon en serĉo de konvenaj okupoj. Kaj krome, multaj gejunuloj diplomitiĝintaj el universitatoj volas labori en grandaj urboj aŭ ĉemaraj regionoj ekonomie evoluintaj. Ĉio ĉi kaŭzis relativan superfluron de la laborantoj en iuj lokoj kaj samtempe malhelpas ilian glatan dungigon.

POR BONA OKUPO

Nun multaj pli-ol-50-jaraj homoj plendas: "En la pasinteco ni plene obeis la ŝtaton. Tiun

okupon, kiun la ŝtato donis al ni, ni bone plenumis kaj neniam volis ŝanĝi. Sed la nunaj gejunuloj estas tute malsamaj, ili ŝanĝas sian okupon preskaŭ post ĉiu dua aŭ tria jaro, ĉar al ili ne plaĉas la nuna okupo kaj ili volas havigi al si pli bonan." Junaj homoj



En dung-agentejo Foto de CHEN ZONGLIE

ja opinias, ke tiujn vortojn diras nur ŝtipoj.

Kio do estas bona okupo laŭ la nunaj gejunuloj? Fakte, la tiel nomata bona okupo ne havas difinitan kriterion. Ĝia signifo ŝanĝiĝas kun la socia evoluo kaj koncepto. Antaŭ 5 jaroj la studentoj kun ĝojo laboris en grandaj ŝtataj entreprenoj, ĉar tie la funkciuloj havas difinitan salajron kaj vizitas kuracistojn ŝtatpage. An-

taŭ 3 jaroj multaj fakaj laborantoj sin direktis al establoj de alilandaj entreprenistoj en Ĉinio kaj entreprenoj kune investitaj de Ĉinio kaj alia lando, ĉar tie la labor-medio estas bona, salajroj alta. De la pasinta jaro multaj oficistoj de alilandaj entreprenoj sin anoncis por kandidatiĝi al posteno en ŝtata institucio. Ili diris, ke kvankam alilandaj entreprenoj multe salajras ilin, tamen tie estas malfacile realigi ties idealon.

El ĵurnaloj kaj televido oni multe informiĝas pri varbado kaj dungado. En la tuta lando estas 1 800 merkatoj de laboruloj kaj banko de informoj pri dungotoj livereblaj per la tutlanda komputera reto. Por kapabluloj estas facile trovi konvenan okupon. En Pekino preskaŭ ĉiumonate okazas kunveno por akcepti talentajn personojn, similaj kunvenoj okazas ankaŭ en distriktoj de la urbo. Laŭ enketo, vizitantoj de tia kunveno plejparte estas junaj homoj ankoraŭ laborantaj. Ili malkaŝas sian motivon serĉi

okupon pli taŭgan por disvolvi sian talenton.

La socio evoluas. Antaŭ 20-30 jaroj oni laboris laŭ decido de la ŝtato kaj tiam oni ne rajtis mem elekti okupon kaj devis labori en entrepreno preskaŭ la tutan vivon. Hodiaŭ, se vi vizitas la merkaton de laboruloj, vi komprenas, kial junaj homoj opinias ŝtipoj la pli aĝajn, kiuj plendas kontraŭ okupo-ŝanĝo. ■

Rikoltistoj de tritiko

de JIN LANG



Kombajnoj laboras.



Labor-paŭzo

EN la sezono de tritika rikolto iuj kamparanoj de Gansu-provinco kaj Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono arope rapidas al tritika regiono de Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco, okcidenta Ĉinio. Ili estas dungitaj por rikolti tritikon tie, tial oni nomas ilin rikoltistoj de tritiko.

Laŭdire, en Gansu-provinco estis fraŭlino, kiu edziniĝis al viro de Shaanxi-provinco centojn da km. fore. Ŝia fratino sopiris ŝin kaj volis viziti ŝin. Survoje ŝi rimarkis, ke la tritiko maturiĝas pli frue ol tiu en la hejmloko je duonmonato, kaj pro manko de laborforto oni ne povas rikolti ĝin ĝustatempe. Ŝi informis tion al samvilaĝanoj, kiuj volonte fariĝis rikoltistoj de tritiko. Ilin sekvis ankaŭ posteuloj. Precipe en Gansu kaj Ningxia, kie agrikulturo evoluas malrapide, estas superflua laborforto, tial nemalmultaj kamparanoj fariĝis rikoltistoj de tritiko.

En Ĉinio oni konsideras tritikan rikolton kiel plej streĉan kamplaboron. Precipe en evoluinta regiono oni rikoltas tritikon per falĉilo, kaj pro kaprica pluvo tuta rikolto povus perdiĝi. Tial oni rikoltas tritikon senprokraste. La rapideco estas tre grava. En la fruaj jaroj tritik-rikoltistoj estis ĉiam hastemaj. Ili portis pajlan ĉapelon kaj malhelbluajn drelikajn vestojn, kun litkovrilo sur la dorso, ruĝan tukon ĉirkaŭ la talio kiel signon de paco kaj brilant falĉilon sub la

tuko. Ili laboras tage kaj nokte. Tage la vestoj protektas ilin kontraŭ la suno kaj nokte kontraŭ malvarmo.

Tritik-rikoltistoj devenas de unu vilaĝo aŭ unu tribo. Inter ili troviĝas pli-ol-60-jaraj maljunuloj kaj dekelkjaraj knaboj, kaj la plejaĝa fariĝas gvidanto. Ili veturas al labor-loko per trajno, aŭtobuso, traktoro aŭ azen-ĉaro, aŭ marŝas. Tion ili faras laŭ poŝo kaj plaĉo.

Tritik-rikoltistoj plej zorgas pri rekompenco. Ĝenerale la gvidanto mem aŭ perantoj diskutas kun dunganto pri la sumo. Oni devas obei la interkonsenton, eĉ se la dunganto volas pli multe pagi, la rikoltistoj ne povas akcepti, alie oni konsideras ilin malestimindaj. Tio montras iliajn malkaŝemon kaj honestecon.

La rikoltistoj ĝojas helpi tiujn dungantojn, kiuj estas malriĉaj kaj nepagipovaj. Foje maljuna rikoltisto Zhao renkontis tian okazaĵon. La vetera prognozo diris, ke post du tagoj pluvegos. Do, rikoltistoj estis urĝe bezonataj. Por rikolti tritikon antaŭ la pluvego, lokaj kamparanoj volis pli multe pagi. Dum Zhao estis sin proponanta, li rimarkis iun virinon, tristmienen kaj heziteman inter dungotoj. Ŝi havis iom pli ol unu hektaron da tritikaj kampoj, tamen ŝia edzo kuŝis en lito pro malsano kaj ŝi mem ne povis fini rikoltadon antaŭ la pluvego, kaj krome ŝi ne havis monon por dungi rikoltiston. Aŭdinte tion, maljunulo Zhao senhezite gvidis grupon da rikoltistoj labori senpage por ŝi.

En multaj lokoj de Ĉinio oni uzas falĉilojn por rikolti tritikon. Lerta falĉado estas alte taksata. Ruliĝado de tritikaj ondoj kaj rapida falĉado fariĝis originala pejzaĝo de kamparo. Li Erguai, rikoltisto el Gansu-provinco, famiĝis pro lerteco kaj honesteco.



Sur draŝejo

Lia grupo jam nombras 300 personojn kaj kreis rekordon, ke ĉiu homo ĉiutage rikoltas 1/5 hektaron da tritiko. Rapideco donas al ili pli multe da mono.

La tero de Ĉinio estas vasta. Tritiko maturiĝas en malsamaj tempoj. Rikoltistoj rikoltas de la suda parto al la norda. Ĉie ili estas bonvenaj. Nur en la lastaj jaroj ili maltrankviliĝis. Sur iuj kampoj eklaboris kombajnoj anstataŭ rikoltistoj, kiel ilia forta konkuranto. Ili komprenas ke maŝino anstataŭos falĉilon pli-malpli frue.

Laŭ statistiko de koncerna departemento, en Shaanxi, Hebei, Henan, Shandong kaj aliaj ĉefaj tritik-produktaj provincoj ĉiujare laboras 10 000 kombajnoj.

Mi demandis iun kamparanon en Henan, kial li preferas multekostan maŝinan rikoltadon. Li respondis ke maŝino ne nur ŝparas tempon, sed ankaŭ rikoltas komplete. Falĉilo

postulas 5-6 tagojn, por maŝino duontago sufiĉas. Tial oni ne nur havas tempon por fari alian laboron, sed ankaŭ povas pli frue kulturi maizon.

Nuntempe maŝinoj ne estas vaste uzataj precipe en montregionoj de suda Ĉinio. Laŭ koncerna materialo, maŝinoj plugas 60% de la agroj, prisemas 20% kaj rikoltas sur 11%. Multaj kamparanoj ankoraŭ laboras surkampe. Tritik-rikoltistoj, kiel specialaj kamplaboristoj de Ĉinio, povas daŭre ekzisti. Tiuj, kiuj vendas sian laborforton, kompreneble deziras rikoltan maŝinon por aliĝi al la nova rikoltista vicaro. ■

Estas bonvenaj represoj kaj tradukoj el "El Popola Ĉinio" kun indiko de la fonto, kaj la redakcio kore petas ties specimenon.

Klasikaj poemoj

“Libro de Poezio” estas la unua kolekto de poemoj de Ĉinio, en kiun oni enmetis 305 poemojn (11-a jc. a.K. — 6-a jc. a.K.), inkluzive lokajn popolkantojn, kortegajn himnojn kaj kultajn kantojn. Ni publikigas sube “Kverantaj pandionoj” kaj “Vasta Han-rivero”, ĉefajn amkantojn el “Libro de Poezio”, kiujn elĉinigis s-ro Shi Chengtai.

La Red.

KVERANTAJ PANDIONOJ

Junulo vidas belan knabinon ĉe rivero, kiu plukas braseniojn, kaj korinklinas al ŝi.*

Sur rivera et-insulo kveras paro pandiona. Enamiĝas ĉi junulo al knabino bela, bona.

Longaj, kurtaj brasenioj kreskas, svelte ŝi elŝiras. Pri l' knabino iluzioj eĉ tagnokte en li giras.

Al ŝi korinklinas vane, li tagnokte en am-revo. Kaj senĉese pasi-flame lin turmentas sopirdevo.



Longaj, kurtaj brasenioj de ŝi lerte amasiĝas. Fianĉin' en lir-arioj la knabino ja fariĝas.

Longaj, kurtaj brasenioj selektiĝas delikate. Ŝin ĝojigas simfonioj tamburade kaj tintade.

VASTA HAN-RIVERO

Juna hejtaĵ-hakisto amas junulinon, sed ne gajnas ŝian amon. Sopirante al ŝi, li kantas.

*Arbo en la sudo altas, sub la ombro mi ne haltas. Junulino Han-rivere,** mi ne gajnas ŝin espere. Han torentas larĝe, vaste, trans ĝi mi ne naĝas haste. Rivero longe flu-tiras, kaj ĝin mi ne ĉirkaŭiras.*

Kreskas arbustoj amase, veprojn hakas mi emfaze. Se vi edzigos min vole, nutras mi ĉevalon fole. Han torentas larĝe, vaste, trans ĝi mi ne naĝas haste. Rivero longe flu-tiras, kaj ĝin mi ne ĉirkaŭiras.

Absintoj dense prosperas, abrotanojn mi preferas.

Gajaj kanceruloj



En la Paradizo por Batalantoj kontraŭ Kancero

FRUMATENE s-ro Jin eniris en la proksiman parkon, kiun li vizitas ĉiutage de antaŭ unu jaro, kiam li eksuferis de kancero. En la parko troviĝas “Paradizo por batalantoj kontraŭ kancero”. Tie kolektiĝis dekoj da kanceruloj. S-ro Jin konfesis, ke la kanceruloj simpatias unu kun alia, tie ili facile interkomunikiĝas kaj bone

komprenas unu alian. Sekve la loko nature fariĝis intima kaj gaja por ili.

S-ro Jin baldaŭ renkontiĝis kun siaj amikoj en bosko. Iuj mallaŭte interparolis kaj la aliaj en rondo faris ĉigong-ekzercadon. Neniu el ili aspektis grave malsana. Jin klarigis: “Kiam mi unuafoje venis tien, mi ne estis tiel sana kiel nun. Tiam mi estis ege mal-

forta kaj intencis min mortigi timigite de la malsano. Poste oni diris al mi, ke estas societo de kanceruloj, kaj kondukis min tien. Tiutage, kiam mi venis, min tuj ĉirkaŭis multaj homoj. Ili demandis min pri io kaj alio. Informiĝinte, ke mi suferas de hepata kancero, tiuj suferantoj de la sama kancero unu post alia rakontis al mi sian sperton. Tiel gajaj, iuj suferis kanceron jam 5 jarojn, aliaj 8 jarojn kaj triaj eĉ dekelkajn jarojn. Tiumomente mi tuj sentis, ke kancero ne estas tiel timinda. Ĉu ili ĉiuj ne vivas tre bone?!”

Vere, la kanceruloj en la “paradizo” estas optimismaj. Ili kredas, ke kancero ne egalas malesperon. Ili tute malkaŝe parolas pri sia malsano, kvazaŭ ili rakontus pri alies historio. Ili opinias, ke konversacio estas efika kuracado. En konversacio ili ne nur mildigas sian mensan streĉitecon, sed ankaŭ ekzercas sin en pensado. Jen kial ili estas tiel parolemaj en la “paradizo”.

El ilia parolado mi informiĝis, ke en nemalmultaj ĉinaj urboj aktivadas similaj societoj, kiujn organizis kanceruloj mem, kaj plejparte malnovaj su-

*Se vi edzigos min vole,
prenos vin per ĉar’ mi kore.
Han torentas larĝe, vaste,
trans ĝi mi ne naĝas haste.
Rivero longe flu-tiras,
kaj ĝin mi ne ĉirkaŭiras.*

- * Brasenio estas manĝebla sovaĝa planto kreskanta en aŭ ĉe akvo.
- ** Han-rivero sin trovas en la nuna provinco Hubei.

ferantoj. La celo de tiuj societoj, simple dirite, estas, ke la kanceruloj havu ankaŭ lokon por distriĝo kaj resaniĝo krom kuracado kaj operacio, kaj ke ili sciu, ke ili ne estas senkapablaj antaŭ la malsano kaj eĉ la Morto kaj ili devas batali kontraŭ la malsano kaj Morto ŝultro ĉe ŝultro. Krome, ili akiris zorgon kaj subtenon de la socio. Hospitaloj kaj medicinistoj ofte faras prelegon kaj senpagan kuracadon al ili, kaj krome iuj entreprenoj ilin multe helpas.

La plej kortuŝantaj estas la membroj de la “paradizo”, ili ĉiuj povas esti laŭdataj kiel bravuloj. Tie mi plurfoje aŭdis la nomon Zhang Shengxian, kiu suferas de kancero jam 42 jarojn kaj ĝis nun ankoraŭ laboras.

Poste mi vizitis Zhang Shengxian en lia oficejo. Laŭ aspekto oni malfacile povas imagi al si, ke li havas eĉ tian neordinaran travivaĵon. Li estas simpla homo. Koninte lian pasintaĵon, mi elkore respektas lin. Antaŭ 42 jaroj Zhang Shengxian, kiu baldaŭ diplomiĝos el universitato, estis amputita je la dekstra kruro pro osta kancero. Post kelkaj jaroj malsano denove metis lin sur operacian tablon kaj oni amputis

al li duonon de la maldekstra pulmo. En 1978 lia edzino, kiu kune kun li dividis la suferon dum multaj jaroj, forpasis pro kancero, kaj la kvietaj vivo denove rompiĝis. La atakoj ne frakasis lin, male fortigis lin. En la pasintaj 42 jaroj li ekzercis sin obstine per sia nova krura protezo, li mem iris al hospitalo por operaciado, sen sciigi sian akuŝontan edzinon... Ĉiaokaze li ne forlasis sian laboron. Kiel inĝeniero pri elektroenergio, li postlasis siajn spurajn sur sterilaj montoj kaj dezertoj. Foje li laboris en ŝakto, lia malligiĝinta krura protezo enkarniĝis, li kun granda sufero finis la tutan vojon. Krome, li plenumis 20 disertaĵojn kaj esploradojn pri struktura sistemo de armita betono fortikigita per eksteraj ŝtalaj stangetoj. Li neniam rigardas sin malsanulo kaj ankaŭ liaj kamaradoj ofte forgesas, ke li estas kancerulo kun krura protezo.

La malkaŝema onklogo Wu, unu el la organizantoj de la “paradizo”, diris: “Tie la vivo de ĉiu ajn kuraĝigas la aliajn. Zhang Shengxian ludas ĝuste tian rolon kaj ĉiuj laŭdas lin.” Ankaŭ Wu estas kancerulino kaj ŝi kiel or-

ganizanto de la “paradizo” faras pli multe ol la aliaj. Ŝi konigis al mi, ke ili ofte sin amuzas per dancado en rondoj, kantado de pekina opero, prezentado de laŭmodaj vestoj kaj eĉ infanaj ludoj, kiaj kaŝiĝo kaj sidglitado malsupren. Ili sin amuzas per ĉio ajn, se nur ĝi povas ĝojigi ilin. Montrante al la brila lago, ŝi diris al mi: “Vintre ni kiel kutime distriĝas sur la glaciĝinta lago per neĝbuloj. Ni kelkdekoje kuregis kaj kriegis. Kiel ĝojaj ni estas!”

En la “paradizo” mi vidis foton kun grupo da viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj, kiuj ĉiuj portas ruĝan sportkostumon kaj ĉarman ĉapon. Sur iliaj vizaĝoj legiĝas plena espero al la vivo kaj familia harmonio. Onklogo Wu diris al mi ankaŭ, ke la “paradizo” vere similas al granda familio. Kiam iu el la “familianoj” enhospitaliĝis, la aliaj certe iris viziti lin; kiam iu ĉagreniĝis, aliaj lin konsolis. En Tianjin estis junulino, kiu intencis sin mortigi pro mama kancero. Informiĝinte pri tio, du maljunulinoj de la “paradizo” kelkfoje trajne veturis al ŝia hejmo en Tianjin. Vidinte, ke la maljunaj malsanulinoj supreniris la 6-an etaĝon kun donacaĵo en la brakoj apenaŭ levoblaj pro ŝveliĝo, ŝi larmis kortuŝite: “Mi perdis mian patrinon en la infaneco, sed nun mi havas du patrinojn en Pekino.” La patrinceca amo finfine donis al ŝi vivkuraĝon.

Invitite, mi partoprenis renkontiĝon de la “paradizo”. En la renkontiĝo oni festis la “5-jariĝon” por du kanceruloj. Oni diris, ke la 5 jaroj por operaciitaj kanceruloj estas gravaj, se ili trapasis tiun punkton, ili venkis. Sur la provizora scenejo oni prezentis diversajn programerojn, kiaj tajĝjiĉuan kaj pekina opero, fine ĉiuj ĥore kantis: “Gajan naskiĝtagon...” La kanto longe eĥis. Oni kantis la sinceran gratulon por la samsuferantoj kaj ankaŭ por si mem. “Ni vivos, vivos gaje.” ■

Kanceruloj en mateno



ZHANG WEN:


Turismo en Hongkong



La ĉefa halo
en Boliu-
templo

Foto de
LIU JIN

En la Oceana
Parko de
Hongkong
Foto de
SHEN YANTAI



HONGKONG famas pro sia graveco ne nur en komerco kaj financo, sed ankaŭ en turismo por la mondo. Ekde 1995 Hongkong akceptis pli ol 10 milionojn da turistoj ĉiujare.

Taipo-monto estas la plej alta loko en Hongkong. Starante sur ĝi, oni povas ĝui la panoraman vidon de Hongkong: homoplenajn stratojn, ĉielskrapantojn, la Viktorian Havenon kaj dissemitajn insuletojn en malproksimo. Kiam

falas nokto, ekbrilas sennombraj neonlampo.

Vizitindaj estas golfoj en Hongkong. La longa marbordo, insuloj kaj duoninsuloj formas multe da golfoj kun diversaj trajtoj. Ekz., la Grandonda Golfo famas pro siaj grandaj ondoj. Kiam blovas orienta vento, furiozas ondoj en ĝi. Sekkong-golfo distingiĝas per vasta plaĝo, subtila sablaro kaj pura marakvo. La U-forma Taitam-golfo inter du longaj duoninsuloj estas ideala haveno.

En Hongkong oni ĉiam sentas modernecon influatan de la okcidenta kulturo. Tamen Boliu-templo, unu el la tri budhismaj sanktejoj en Hongkong, elspiras fortan etoson de la orienta kulturo. La templo alkroĉiĝas al montdeklivo. En 1913, kiam bonzo Ji Xiu (Ĝji Ŝiŭ) funkciis kiel abato de la templo, ĝi prosperiĝis kaj fariĝis la plej granda templo en Hongkong post dekoj da jaroj. La konstruaĵoj en la templo estas grandiozaj, kun flavaj tegoloj, ruĝaj muroj, altaj terasoj kaj longaj ŝtuparoj. En la ĉefa halo estas kultataj tri oraj budho-statuoj en la mezo kaj 500 arhatoj ĉe la muroj. En la florigardeno malantaŭ la templo estas pagodo kun relikvo de Ji Xiu ene. Pro kvieta medio kaj kontentiga pasloĝigo la templo allogas multe da turistoj. En la pasintaj jaroj antaŭ ĝi oni konstruis la bronzan statuon de Budho de Ĉiela Altaro, plej grandan subĉielan en la mondo.

Vizitinda estas ankaŭ la Urbeto de Song-dinastio, konstruita imite al tiu de la dinastio (960-1279) prezentata en la fama pentraĵo "Ĉe Rivero en la Festo de Klara kaj Brilo". La antikvaj konstruaĵoj, kiaj butikoj, restoracioj kaj tevendejoj, staras ĉe ambaŭ bordoj de la rivero. Komizoj servas en kostumoj de Song-dinastia modo. Kaj en la vaka tereno prezentiĝas dancoj kaj varietejoj.

En Hongkong estas du specoj de distrejoj: Unu por ripozigi turistojn, ekz., la Viktoria Parko, Montsupra Parko kaj Kowloon-parko kun tradiciaj ĉinaj ĝardenistikaj konstruaĵoj kiel la ĉefaj, kaj la alia por apreci kaj protekti sovaĝajn bestojn kaj plantojn, ekz., akvario en la Hongkong-a Oceana Parko kaj antaŭurbaj parkoj.

Hongkong estas ne nur vizitindejoj, sed ankaŭ ideala aĉetejo en la mondo. En ĝi vendiĝas diversspecaj artaĵoj el la Oriento kaj produktaĵoj de famaj markoj el diversaj partoj de la mondo. Komprenoble, ĝui pladojn el markreskaĵoj en Hongkong estas grava aktivado por multaj turistoj. ■

DISTRO EN KAMPARO

Tio estas nova turisma programo multe ŝatata de turistoj ĉinaj kaj alilandaj, ĉar ĝi okazas en ĉinaj vilaĝoj kun iaj trajtoj kaj ĉiuj turistoj povas sperti tie kamparan vivon. Ĉe Fuchun-rivero en Zhejiang-provinco ja estas tia turisma loko.

Ĝi konsistas el 3 vilaĝoj, el kiuj Xinshadao similas al giganta smeraldo sur blua akvo. En la vilaĝo kun areo de 4.12 kvadrataj kilometroj vivas malpli ol mil loĝantoj. Ambaŭflanke de la sabla vojo kreskas altaj metasekvojoj (*Metasequoia glyptostroboides*). Sur herbokovritaj montdeklivoj petolas kaproj nigraj kaj blankaj, ripozas bubaloj samkoloraj.

La turistoj ĝuas belajn pejzaĝojn kamparajn, veturante per antikva ĉaro tirata de bovo.

Tie la turistoj povas mem fari kamparajn laborojn per antikvaj laboriloj: senŝeligi rizon per lignaj aŭ ŝtonaj bastonoj, mueli tritikon per ŝtona muelilo, ŝpini silkon... Tiaj antikvaj laboriloj preskaŭ ne vidiĝas en aliaj ĉinaj vilaĝoj, tial ili vekas grandan intereson ĉe la turistoj. Kvankam oni mallerte manipulas norion, tamen oni sentas ĝojon en tio kaj ofte ekridegas pro la mallertaĵo.

En Heshang-vilaĝo la turistoj povas viziti kamparanajn domojn, preni manĝaĵojn kune kun la mastroj kaj nokti tie. Tage ili povas labori en tegardeno, viziti fabrikon kaj babili kun kamparanoj,



kaj vespere ĝui lokan operon akompanatan de tamburado. La turistoj povas ankaŭ ludi kartojn, ĉinan ŝakon, gitaron kaj rulsketi.

En la kvietaj Chisong-vilaĝoj prosperas pinoj kaj bambuoj. La turistoj tie rigardas, kiel la vilaĝanoj prilaboras bambuojn kaj lianojn por plekti el ili belajn florvazojn, florkorbojn kaj aliajn metiartaĵojn. Ankaŭ la turistoj povas lerni la metion por fari memoraĵojn.

KAVO N-RO 2 DE LA TERAKOTA LEGIO ĈE LA MAŬZOLEO DE LA UNUA IMPERiestRO DE QIN-DINASTIO

La terakota legio en la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221 a.K. - 206 a.K.) estas mondfama historia restaĵo. Ĝi troviĝas en 3 kavoj. La kavoj n-roj 1 kaj 3 estis prifositaj kaj malfermiĝis al la rigardantoj aŭtune de 1979 kaj 1989 respektive. La kavo n-ro 2 prifosiĝis marte de 1994 kaj en oktobro de tiu jaro konstruiĝis ĝia eksponhalo kaj malfermiĝis al la publiko.

Post 3-jara prifosado finiĝis la unuaperioda laboro. La arkeologoj ekkonis la supran tavolon de la kavo kaj trovis 11 pordojn kaj 3 strukturojn por ilin ŝtopi. Ili daŭre laboris kaj elterigis 86 argilajn militistojn, 44 argilajn ĉarojn kaj ĉevalojn, inter kiuj estas unugenue arkpafantaj soldatoj kaj rajdistoj tenantaj rimenon de ĉevalo kaj ankaŭ kaleŝoj kun 4 koĉeroj post si. Ili, pli raraj ol tiuj en la kavoj



Dekstre: Terakota militisto elterigita en la kavo n-ro 2

Maldekstre: Ĉinaj arkeologoj observantaj la koloron de la kapo de terakota homo

n-roj 1 kaj 3, estas majstroverkoj de la antikva ĉina skulpturo.

La ĉinaj arkeologoj ne kontentiĝis pri la eltrovaĵoj. Ili serioze laboris por koni diversajn delikatajn signojn. En ĉiuj gravaj lokoj ili uzis bambuajn skrapilojn, brosojn kaj penikojn, faris atenteme ordigon kaj ekkonis multajn aferojn. En la orienta halo ili trovis malsamajn postsignojn lasitajn de ŝoveliloj kaj feraj pingloj kaj eĉ tiujn lasitajn de pluvo kaj lumbrikoj. Ĉio ĉi tio estas tre valora por studi pri la laboriloj, veturiloj kaj materialoj uzitaj en konstruado de la kavo kaj pri la tiama klimato kaj hidrologia ŝanĝiĝo.

Por doni al la homaro kompletajn materialojn de la esenca parto de la terakota legio, la arkeologoj ne nur faris detalajn notojn, bildojn kaj fotojn, sed ankaŭ uzis registratorojn kaj komputilojn.

MIRINDA LAGO KUN SALA KAJ SENSALA AKVO

En la limregiono de Xinjiang, Qinghai kaj Tibeto en la okcidenta parto de Ĉinio estas lago, en kies okcidenta parto estas sala akvo kaj en kies orienta sensala. La sala kaj sensala akvo interligiĝas, tamen ne intermiksiĝas.

Pro ĝia formo de baleno oni nomas ĝin Balena Lago. Ĝi areo 260 kvadratajn kilometrojn kun profundo de 2-10 metroj, 4 700 metrojn super la marnivelo.

Sabla digo dividas la lagon en la orientan kaj okcidentan partojn. Meze de la digo estas breĉo 20 m larĝa. La du partoj interligiĝas tie. La akvo de degelinta glacirivero fluas en la lagon ĉe ĝia orienta flanko. La akvo sensala estas malvarma kaj eĉ en somero ĝia temperaturo estas preskaŭ 0°C. Pro malvarmo tie vivas neniu fiŝo, nur planktonoj. Tien ofte flugas miloj kaj dekmiloj da brunkapaj mevoj kaj diversaj sovaĝaj anseroj por serĉi manĝaĵojn, pasigi someron kaj naski idojn. Laŭ takso, ĉiujare tien flugas almenaŭ 200 miloj da brunkapaj mevoj. Aŭtune la birdidoj migras suden kun siaj gepatroj.

Krom birdoj, ankaŭ brunaj ursoj serĉas tie planktonojn. Fakuloj opinias, ke planktonoj estas valoraj por utiligo.

Ĉar la okcidenta parto de la lago ne havas elirejon, ĝia konstanta vaporiĝo rapide levas ĝian entenon de mineraloj. En tiu parto estas neniu planktono kaj kompreneble ne vidiĝas birdoj nek bestoj. Tie la morta silento akre kontrastas kun la orienta parto.

Norde de la lago, sur vasta stepo vivas gregoj da kianoj, pantolopoj (*Pantholops hodgsoni*) kaj sovaĝaj poefagoj.

Kaligrafo Tian Yuxin



Tian Yuxin en kaligrafado

EN kabineto de prof. Tian Yuxin vidiĝas multaj belaj kaligrafaĵoj. Sur ili iuj ideogramoj malgrandas je malpli 3 cm, aliaj grandas je pli ol unu metro. Ĉinaj ideogramoj originas de pentraĵo. Antikvaj ĉinoj iam gravuris ilin sur ostoj de testudoj kaj aliaj bestoj, bronzaĵoj kaj steleoj. Poste ili skribis sur silkaĵoj kaj papero per peniko kaj ĉina inko. Pro historia evoluo en kelkmil jaroj formiĝis diversaj reguloj kaj pluraj stiloj de la skribado, tio estas ĉina kaligrafio.

S-ro Tian, 55-jara, lertas en skribado de li-stilaj ideogramoj (antikva kaligrafia stilo uzata en Han-dinastio, kiu daŭris de 206 a.K. ĝis 220 p.K.). Laŭdire antaŭ 2 200 jaroj iu servutulo kreis tiun stilon. La strekoj de tiuj ideogramoj estas tre fortaj, multe pli facilaj en skribado ol en tiu de la antikvaj ĝuanŝu-stilaj ideogramoj. S-ro Tian heredis la kaligrafion de antikvuloj, sed ne stereotipe. Li tre lerte faras ĉiajn ideogramajn strekojn, kiuj elspiras ankaŭ ĝuanŝu-an stilon. Li uzas iam “rompitajn strekojn”, kiuj ŝajnigas la ideogramojn eflorskintaj epitaĵoj. Li dediĉas grandan atenton pri la denseco kaj maldenseco de la inko, dikeco, forteco kaj stabileco de la ideogramoj. Tial liaj skribaĵoj estas bravaj kaj senĝenaj.

Influite de la patro, Tian Yuxin ekŝatis kaligrafion en la juneco. Li atente legis epitaĵojn kaj ties imitaĵojn de famaj antikvaj kaligrafoj. Poste li lernis de Qi Gong, nuntempa kaligrafo, samtempe li legis literaturajn verkojn kaj studis artan teorion, tio multe larĝigis lian vidkampon.

Ĉiutage je la 5-a matene, s-ro Tian ellitiĝas kaj komencas sian kaligrafadon. Tio daŭris jardekojn. Foje de la 8-a matene ĝis la 4-a posttagmeze li faris 800-ideograman verkon por ekspozicio. Fininte tion, li rimarkis, ke li preteratentis unu ideogramon. Tial li senhezite prenis la penikon por denova skribado. Li, tro laca, endormiĝis ĉe radiatoroj. Vekiĝinte, li trovis, ke sur la mano aperis vico da vunditaj blazoj.

En Ĉinio estas rakonto pri peniko-tombo: En la antikveco estis kaligrafo, kiu diligente faris kaligrafadon dekojn da jaroj. Liaj eluzitaj penikoj amasiĝis en tombon. Antaŭe mi ne kredis ĝin, sed de s-ro Tian mi scias, ke tio eble estis fakto.



En la simpla ĉambro de s-ro Tian, mi demandis lin pri kaligrafado de kelkaj ideogramoj. Li kun rideto respondis: “Por studi kaligrafion oni devas ne nur lerni de instruisto, sed ankaŭ, kaj eble pli grave, mediti, kaj skribu laŭ sia gusto.” La vortoj estas bona klarigo pri lia kaligrafio. S-ro Tian estas senlaca en instruado de kaligrafio. Li opinias, ke oni devas ankaŭ fortigi sian moralan kulturadon kaj pliiĝi siajn sciojn, ĉar, ĝenerale dirite, la skribaĵoj montras karakteron de la skribanto. Li estas firmvola, serioza kaj bonkondata, same statas lia kaligrafio. Li instruis en kelkaj altlernejoj de Pekino. Iuj el liaj disĉiploj jam fariĝis bone konataj kaligrafoj. Li ĝojas, ke iuj junuloj el Japanio, Eŭropo kaj Ameriko ŝatas ĉinan kaligrafion kaj bele skribas. Por instrui gejunulojn, li oferis multe da feriaj tagoj. Komence de 1997 li veturis al Singapuro por instrui kaligrafion. ■

Wulingyuan

Wulingyuan en okcidenta Hunan, Ĉinio, kun 130 kvadrataj kilometroj konsistas el la vidindejoj Zhangjiajie (Ĝangĝjaĝje), Tianzishan kaj Suoxiyu (Sŭoŝjiju). Sankciite de Unesko, ĝi estas enlistigita en la Katalogon de Mondaj Heredaĵoj.

En ĝi staras diversaj montpintoj, etendiĝas valoj kaj prosperas arbaroj. 94% de ĝi estas kovritaj de flaŭro, kun raraj arboj kaj bestoj.

La poŝtmarka serio el kvar pecoj figuras originalajn rokojn, montpintojn kaj valojn de Wulingyuan kaj prezentas la diversecon, unikecon kaj belecon de ĝiaj pejzaĝoj. La poŝtmarkoj estis emisiitaj de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio en 1994.



**Näsijärvi-
lago de
Finnlando
de WANG
LIHUA
(Ĉinio)**



**Boatejo ĉe
lago
de MALTE
MARKHEDEN
(Svedio)**

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九七年第八期
(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2